



ESPERANTO



Reilua viestintää
Rättvis Kommunikation



Esperantonkielinen filmi, s. 6

Steletto ne plu brilas, p. 10–16

Aŭtunaj Tagoj en Iisalmi, p. 17–22

Unu vivo, unu servado, p. 24–26

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1907. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Finna Esperantisto 1907–1914, Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.

Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Tekstit ja kuvat lainattavissa Suomen Esperantoliiton (EAF) tai tekijän luvalla. Lähde mainittava.

För att använda verket behövs tillstånd av Esperantoförbundet (EAF) eller av upphovspersonen.

Källan ska anges. Tekstojn kaj bildojn oni rajtas reuzi nur kun permeso de la redakcio (EAF) aŭ

de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo, eaf@esperanto.fi

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Juha Metsäkallas*

Toimitussihtööri/Redaktionssekreterare/Redakta sekretario: *Tiina Oittinen*

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi*, maj-lis@maisinpaja.info

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 25 €/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso sivu 5 / Por membroj: vidu p. 5

Tilaukset, osoitteenmuutokset/ Prenumerationer, adressförändringar/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, eaf@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Kansi/Pärm/Kovrile: *Sakari Bister* dum filmada paŭzo kun la aktorino *Inkeri Hyvönen (Ella)*. Sakari Bister ja näyttelijä Inkeri Hyvönen (Ella) kuvaustauolla. Foto: *Lotta Lemetti*.

Esperanto-Asocio de Finnlando w Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Juha Metsäkallas*

Turku, eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Paula Niinikorpi*

Pori, paula.niinikorpi@gmail.com

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Turku, 050 549 4709, eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Tuomo Grundström, Rauma, 0440 199 766, tuomo.grundstrom@gmail.com

Sylvia Hämäläinen, Tampere, 050 321 4313, sylvia.h@kolumbus.fi

Tiina Kosunen, Espoo, 044 576 3314, eafkasisto@esperanto.fi

Arja Kuhanen, Tammela, kuhanenarja@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Päivi Saarinen, Helsinki, 050 490 0154: paivi.saarinen@iki.fi

Robert Bogenschneider, Pori, brilanto@gmail.com

Leila Tiitto, Oulu, leila.a.tiitto@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Espoo, 044 576 3314, eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): katso yllä, vidu supren, se ovan

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA: FI57 1815 2913 6360 14, NDEAFIHH

UEA/EAF/ILEI: *Tiina Kosunen*, 044 576 3314, cefdelegito@esperanto.fi

www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando

Esperantolehti ilmestyy vuonna / aperas dum la jaro 2024

Nro	Limdato	Aperas
5/2024	24.11.	en decembro

Ilmoitushinnat / Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 €	1/1 sivu/paĝo 50 €
1/2 sivu/paĝo 60 €	1/2 sivu/paĝo 30 €
1/4 sivu/paĝo 40 €	1/4 sivu/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn. Lähetä ilmoitukset: eaf@esperanto.fi



Syksyn koittaessa

Kesä on jälleen vaihtunut syksyksi, ja on sopiva aika kerrata menneen kesän kohokohtia.

Kesän alussa joukko oppilaita kokoontui esperantoliiton kesäkurssille, joka pidettiin tänä vuonna Tampereella. Mukana oli niin vanhoja konkareita kertaamassa ja syventämässä kielitaitoaan kuin uusia tulokkaita oppimassa kieltä. Oppituntien lisäksi ohjelmassa oli mm. kiertokävely Pispalanharjun hienoissa maisemissa paikallisen oppaan johdolla. Itsekin mukana olleena voin todeta, että kesäkurssi on oiva perinne, joka vahvistaa esperantoyhteisön henkeä Suomessa.

Merkittävä tapahtuma esperantoyhteisölle on aina UEA:n maailmankongressi, joka pidettiin tänä vuonna ainutlaatuisessa kohteessa – Tansaniassa. Yhdeksisensataa esperantistia ilmoittautui ympäri maailmaa kongressiin, jonka teemana tällä kertaa oli *Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo*. Muiden esperantistien tapaamisen ohella monelle Afrikan ulkopuolelta tulleelle osallistujalle avautui ainutlaatuinen mahdollisuus tutustua tansanialaiseen kulttuuriin. Olemme saaneet lukea kongressista mm. *Libera foliosta*, minkä lisäksi tässä lehdessä on artikkeli aiheesta.

Maailmankongressin lisäksi kesällä pidettiin mm. *Internacia Junulara Kongreso (IJK)* Liettuassa ja *Itala Kongreso de Esperanto*, joista molemmista saamme lukea tästä lehdestä.

Syksy puolestaan alkoi juhlavissa merkeissä, kun Iisalmen Esperanto-klubi vietti 50-vuotisjuhlaansa syyskuun alussa. Tämä

puolen vuosisadan mittainen taival on osoitus seuran pitkäjänteisestä työstä esperanton hyväksi Pohjois-Savossa ja koko Suomessa. Juhlan ohjelmaan kuului konsertti Iisalmen kulttuurikeskuksessa, jossa esiintyivät kanteleensoittaja Timo Väänänen sekä vaaalukuinen musiikkiyhtye Asorti.

Vuoden jymyvuutinen on ilman muuta tekeillä oleva lyhytelokuva *Patrinoj – Äidit*. Elokuvaohjaaja Anna Andersson otti keväällä yhteyttä esperantoliittoon ja pyysi apua esperantokielisen lyhytelokuvan tekemiseen. Liiton kokoama tiimi käänsi elokuvan vuorosanat ja lopputekstit sekä harjoitutti näyttelijät ja valvoi itse kuvauksissa ääntämistä. Elokuva on tätä kirjoitettaessa kuvattu, ja jälki-tuotanto on meneillään. Elokuvan levitys alkaa ensi keväänä.

Haluan toivottaa kaikille esperantisteille iloista ja innostavaa syksyä. Vaikka päivät lyhenevät ja ilmat viilenevät, yhteisömme pysyy lämpimänä, ja tapahtumia on tarjolla sekä lähellä että etänä. Toivon, että löydätte uusia tapoja osallistua, oppia ja nauttia esperantosta myös pimeämpinä kuukausina.

Haluan kiittää Iisalmen klubin vuosijuhlissa esiintyneitä sekä juhla valmisteluihin osallistuneita. Suuret kiitokset kuuluvat myös *Patrinoj*-filmin tekoon osallistuneille.

Ni rerenkontiĝu en Esperantujo!

Juha Metsäkallas

Por komenco de aŭtuno

Adaptita surbaze de la finna originalo.

La somero denove transiris al aŭtuno, kaj estas taŭga tempo por rememori la ĉefajn momentojn de la pasinta somero.

Komence de la somero grupo de lernantoj kunvenis al la somerkurso de EAF, kiu kurso ĉi-jare okazis en Tampere. Partoprenis kaj malnovaj veteranoj, kiuj volis ekzerci sin kaj profundigi sian lingvokonon, kaj novaj komencantoj, kiuj volis lerni la lingvon. Krom lecionoj la programo konsistis ekzemple el ekskurso tra la belaj pejzaĝoj de la kresto en *Pispala* kun loka ĉiĉerono. Kiel unu el la partoprenantoj, mi povas konstati, ke la somerkurso estas bonega tradicio, kiu fortigas la spiriton de la Esperanta komunumo en Finnlando.

Grava evento por la Esperanta komunumo estas ĉiam la Universala Kongreso de UEA, kiu ĉi-jare okazis en unika loko – Tanzanio. Ĉirkaŭ naŭcent esperantistoj aliĝis al la kongreso el la tuta mondo, kaj la temo ĉi-foje estis ”Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo”. Krom renkonti aliajn esperantistojn multaj partoprenantoj de ekstere de Afriko havis la unikan ŝancon konatiĝi kun la tanzania kulturo. Ni povis legi pri la kongreso ekzemple en *Libera Folio*, kaj ankaŭ en ĉi tiu gazeto estas artikolo pri la temo.

Krom la Universala Kongreso, dum la somero ankaŭ okazis ekzemple la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Litovio kaj la Itala Kongreso de Esperanto, pri kiuj ni legos en ĉi tiu gazeto.

Aŭtuno komenciĝis festene, kiam la Esperanto-klubo de *Iisalmi* festis sian 50-an jubileon komence de septembro. Ĉi tiu duon-

jarcenta vojaĝo estas signo de la longdaŭra laboro de la klubo por Esperanto en Norda Savonio kaj en tuta Finnlando. La programo de la festo inkluzivis koncerton en la Kultura Centro de Iisalmi, en kiu koncerto ludis la kantelisto *Timo Väänänen* kaj la neplennombra muzikgrupo *Asorti*.

La plej granda novaĵo de la jaro sendube estas la mallonga filmo *Patrinoj – Äidit*, kiu estas nuntempe en produktado. La filmregisorino *Anna Andersson* kontaktis EAF-on printempe kaj petis helpon por fari esperantlingvan mallongan filmon. La teamo kolektita de EAF tradukis la dialogojn kaj la filmistoliston de la filmo, trejnigis la aktorojn kaj kontrolis la prononcon dum la filmado. Ĉe la tempo de ĉi tiu skribo la filmo jam estas filmita kaj la postproduktado estas en progreso. La filma distribuo komenciĝos venontprintempe.

Mi volas deziri al ĉiuj esperantistoj ĝojan kaj entuziasman aŭtunon. Kvankam la tagoj mallongiĝas kaj la vetero malvarmetiĝas, nia komunumo restas varma, estos eventoj kaj ĉeeste kaj per interreto. Mi esperas, ke vi trovos novajn manierojn partopreni, lerni kaj ĝui Esperanton ankaŭ dum la pli malhelaj monatoj.

Ni rerenkontiĝu en Esperantujo!

Juha Metsäkallas

EAF informas – Liitto tiedottaa

Esperantolehden syksyn numero

Tervetuloa lukemaan Esperantolehden numeroa 4b/2024, se on ensimmäinen kokeilu PDF-muotoisesta lehdestä värillisenä. Tämän kokeilun vuoksi lehti saapuu vasta lokakuun puolella. Teetimme arkistoa ja muutamaa kirjastoa varten pienen erän painettua A5-kokoista mustavalkoista lehteä, jonka numero on 4a/2024. Sen saavat myös ne lukijat, jotka syystä tai toisesta eivät pysty lukemaan sähköpostia. Kaikki sähköpostia käyttävät lukijat saavat kaksi lehteä, numerot 4a/2024 ja 4b/2024. Odotamme mielenkiinnolla kommentteja tästä ratkaisusta sähköpostiosoitteeseemme eaf@esperanto.fi.

Joulukuun Esperantolehti 5/2024 ilmestyy taas A5-kokoisena sekä paperisena että PDF-muodossa.

Tiedoksi vuoden 2025 tapahtumista: Talvipäivät ovat suunnitteilla Raumalle ja syyspäivät Tampereelle. Kesäkursin paikkakunta vielä avoin, mutta on ajateltu Hämeenlinnaa.

Suomen Esperantoliiton hallitus

La aŭtuna numero de Esperanta Finnlando

Bonvenon legi la numeron 4b/2024 de Esperanta Finnlando. Tiu gazeto estas multkolora kaj aperas nur en PDF-formo nun en oktobro. Por arkivo ni lasis fari etan paperan eldonkvanton en grandeco de A5 kaj kun numero 4a. Tiun ricevas ankaŭ kelkaj bibliotekoj kaj tiuj abonantoj, kiuj pro iu kialo ne povas legi retpoŝton. Ni volonte ricevos viajn komentojn al nia retpoŝta adreso eaf@esperanto.fi.

Informoj pri niaj venontjaraj eventoj: Ni planas aranĝi Vintrajn Tagojn en Raŭmo kaj Aŭtunajn Tagojn en Tampere. La loko de la Somera kurso ankoraŭ ne estas elektita, sed ni studas eblon havi la kurson en Hämeenlinna.

Estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando

Esperanto-societo en Turku informas

Ni havas la semajnajn renkontojn en ĵaŭdo plej ofte en la kafejo *Tori-Otava* sur la vendoplaco. Se vi venos al Turku pro iu ajn kialo, bonvolu informiĝi ĉe [EST-eventokalendaro](#) en la retejo *Finna Babilejo* aŭ demandu de ni pri la ekzaktaj scioj pri niaj renkontoj.

Bonvenon al Turku!

Turun yhdistyksen viikkotapaamiset ovat keväällä torstaisin yleensä kahvila Tori-Otavassa Turun kauppatorilla. Tervetuloa tapaamaan meitä joko viikkotapaamiseen tai kurseille, mutta varmistu ensin, ettei ole tullut muutoksia. Ota yhteyttä tai katso Finna Babilejon tapahtumakalenterista nimeltä EST-eventokalendaro.

*Por EST-anoj,
Tiina Oittinen
tiina.oittinen@pp.inet.fi*

Esperanto-klubo de Helsinki informas

Membroj de Esperanto-klubo de Helsinki renkontiĝos ankaŭ aŭtune ĉiun duan sabaton en kafejo *Robert's Coffee* en *Sähkötalo*, adreso *Kampinkuja 2*. Ĉiuj renkontiĝoj okazos posttagmeze ja la 14-a horo.

Sekvaj renkontiĝoj:

- sabaton 26.10.
- sabaton 9.11.
- sabaton 23.11.
- sabaton 14.12.

Ĉiuj estas bonvenaj partopreni en la renkontiĝoj. Pro eblaj ŝanĝoj, sekvu informojn en [nia retejo](#).

Tervetuloa tapaamisiin myös ne jotka ovat vasta tutustuneet esperantoon.

*Yhteyshenkilö
Päivi Saarinen
paivi.saarinen@iki.fi*

Esperanto-societo Antaŭen informas – Antaŭen tiedottaa

Ni kunvenas jaŭde je la 14-a en kulturdomo *Laikku* en la kunvenejo *Mäkelä*, 3-a etaĝo.

Kokoonnumme torstaisin klo 14 kulttuuritalo Laikussa kokoushuone Mäkelässä 3. kerroksessa.

7.11.	Komence estrara kunsido kaj poste iu tasko pri E-lingvo. <i>Aluksi hallituksen kokous ja sitten jokin esperantotehtävä.</i>
21.11.	Eleкта kunsido kaj iu E-tasko <i>Vaalikokous ja jotain esperantoksi.</i>
12.12.	Zamenhof kaj juleto. La loko kaj tempo ankoraŭ ne deciditaj. <i>Zamenhof ja pikkujoulu. Paikkaa ja aikaa ei ole vielä päätetty.</i>

Vi estas bonvena partopreni en niaj kunsidoj, sed bonvolu informi al *Raimo Tuisku*, *Sylvia Hämäläinen* aŭ 050 321 4313.

Tervetuloa tapaamisiimme, mutta ole hyvä ja ilmoita siitä Raimo Tuiskulle tai Sylvia Hämäläiselle tai 050 321 4313.

*Estraro de Antaŭen
ja kaikki antaŭenilaiset*

Esperantoklubo de Oulu informas

Saluton!

Nia oŭlua grupeto kunvenas la lastan sabaton de ĉiu monato je la 13-a horo en la biblioteko de *Karjasilta*. Pro fermita pordo, bonvolu informi nin antaŭe, sendu tekstmesaĝon al 040 8329075. Bonvenon!

Eli sama sŭomeksi:

Oulu-ryhmä kokoontuu joka kuun viimeinen lauantai klo 13 Karjasillan kirjastossa. Kirjaston ovi on lukittu, joten kannattaa ilmoittaa tulosta etukäteen, mieluiten tekstarilla minulle. Tervetuloa!

Leila Tiitto

Suomen Esperantoliiton jäsenyhdistykset

- **Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki** (Jukka Pietiläinen)
www.esperanto.fi/helsinki
jukka.p.pietilainen@gmail.com
- **Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi**, (Onni Kauppinen)
Juustolantie 6 A 2, 73100 Lapinlahti
onni.kuappinen@gmail.com
0500 813 530
- **Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry** (Aini Vääräniemi),
Vääräjärventie 26 B, 93590 Vanhala
www.esperanto.fi/oulu
aini.esperanto@gmail.com
- **Esperantoseura Antaŭen r.y. / Esperanto-societo Antaŭen, Tampere**
www.esperanto.fi/grupoj/tampere
raimo.tuisku@saunalahti.fi
050 411 5177
- **Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-Societo en Turku** (Tiina Oittinen),
www.esperanto.fi/grupoj/turku
tiina.oittinen@pp.inet.fi
050 549 4709
- **Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO)**
fejo@esperanto.fi.

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenyhdistysten kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 24 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 48 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Esperanton harrastajia on myös muun muassa Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Jyväskylässä, Lahdessa, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

Esperantonkielinen filmi

Saimme liiton sähköpostiosoitteeseen huhtikuun alussa iloisesti yllättävän viestin ohjaaja Anna Anderssonilta. Hän kirjoitti seuraavasti: *Olen elokuvantekijä Anna Andersson ja olen valmistelemaan esperantonkielistä sodanvastaista lyhytelokuvaa Patrinoj – Äidit. Käsikirjoitus on jo valmis, mutta koska en itse osaa esperantoa, niin tarvitsisin apua elokuvan tekstin kääntämisessä esperantoksi.*

Tästä alkoi koko kevään ja alkukesän kestänyt valmistelu-projekti, johon kuului filmitekstin kääntäminen esperantoksi, näyttelijöiden kieliharjoitukset etäyhteydellä sekä pari live-tapaamista ohjaajan ja joidenkin näyttelijöiden kanssa. Elokuva-hanke anoi ja sai avustusta Fondumo Esperanto-säätiöltä sekä myös Espoon kaupungilta. Koska kyseessä on vapaaehtoisuuteen perustuva projekti, kaikkien osallistujien korvaukset ja palkkiot ovat minimaalisia. Myös Suomen Esperantoliitto on osallistunut kuluihin omien toimihenkilöittensä osalta.

Elokuvan kuvaukset tehtiin elokuussa kuutena kuvauspäivänä eri paikoissa. Lähes jokaisena kuvauspäivänä paikan päällä oli *Sakari Bister*, jonka kokemuksista on juttu tässä samassa lehdessä. Filmin käsikirjoituksen käänsivät *Robert Bogenschneider*, *Juha Metsäkallas* ja *Vilho Virtanen*; kuvausten aikana siihen tuli hieman tarkennuksia. Etäkoulutuk-

sesta huolehtivat pääosin *Robert Bogenschneider* ja *Tiina Oittinen*. Projektiin osallistuvat myös *Paula Niinikorpi* ja *Päivi Saarinen*.

Kuvausten jälkeen elokuvaprojektissa alkoi filmin koostaminen, joka alkoi sopivien kohtauskuvien valinnasta. Sit-ten on vielä vuorossa värimääritys, äännet ja musiikki, lop-putekstien kääntäminen, tekstityksen tekeminen sekä kaik-kien yksityiskohtien hiominen. Filmi on tarkoitus saada val-miiksi vuoden loppuun mennessä niin, että sitä voi tarjota eri lyhytelokuva-festivaaleille vuoden 2025 aikana. Ensimmäinen tällainen iso festivaali on alkuvuodesta Tampereella.

Palaamme filmin vaiheisiin seuraavissa Esperantolehdissä ja tiedotamme siitä muutenkin. Lehden kuvat on otettu filmin kuvaustilanteissa, kuvaajana filmityöryhmässä mukana ollut *Lotta Lemetti*. Näyttelijöiden *Johanna Kuuva (Ava)* ja *Ilkka Olavi (Max)* kuvat saamme seuraavaan lehteen.

Kiitos ohjaajalle ja muulle filmityöryhmälle esperanton valitsemisesta filmin kieleksi sekä mahdollisuudesta osallis-tua filmiprojektin tekoon.

Tiina Oittinen,
filmin esperantotiimin yhteyshenkilö

Esperantlingva filmo farita en Finnlando

En aprilo Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) ricevis inter-san retmesaĝon, kie la reĝisoro *Anna Andersson* petis hel-pon por la filmoprojekto *Patrinoj - Äidit*. La ĉirkaŭ duonhora filmo estas kontraŭmilita kaj ĝia lingvo estas Esperanto.

Ni kolektis teamon, kiu unue tradukis la manuskripton kaj poste helpis la aktorojn lerni la lingvon tiom, ke ili kapab-lus aktori en Esperanto. La lingvotrejnado antaŭ la filmado okazis distance, en *Helsinki* estis unu surloka trejnado kun kelkaj aktoroj. La filmado estis farita en aŭgusto dum 6 tagoj en diversaj lokoj en Suda Finnlando. Dum la filmado-tagoj ĉiam ĉeestis almenaŭ unu esperantisto, kiu ĉefe estis *Sakari Bister*. Legu lian raporton en tiu ĉi gazeto. Fotojn ni ricevis de la filmoprojekto, fotisto estis *Lotta Lemetti*.

La filmoprojekto ricevis ĝis nun subtenon de *Fondumo Esperanto (Fondumo Esperanto-säätiö)* kaj de la urbo *Es-poo*. La tuta projekto baziĝas sur libervola laboro kaj tial ĉiuj rekompencoj estas minimumaj. Nun la filmo estas teknike finfarita kaj la celo estas, ke ĝi pretos fine de la jaro tiel, ke eblos en la jaro 2025 partopreni kun ĝi en diversaj festiva-loj por mallongaj filmoj (maksimume 30 minutaj), unue en Finnlando, poste eble ankaŭ en aliaj landoj. Ni atendas kun granda intereso kiel aspektas la preta filmo kaj nature ni es-peras, ke la filmo povos esti inter la programeroj de la UK en Brno.

raportis Tiina Oittinen,
sekretario de EAF



Esperantonkielisen filmin kuvausavustajana

Filmo en Esperanto: Patrinoj – Äidit

Mia sperto kaj parto en la projekto –
kokemukseni ja osani projektissa.

Kesällä Suomen Esperantoliitto otti minuun yhteyttä tulevan elokuvaprojektin tiimoilta. Tekeillä oli elokuva nimeltä *Patrinoj – Äidit*. Elokuvan tuottaa *Laura Laaksosen Riimu Creative Oy* -niminen tuotantoyhtiö, ja lyhytelokuvan ohjaa ja käsikirjoittaa *Anna Andersson*. Elokuvaa olivat tekemässä ammattilaiset, se sai tukea Espoon kaupungilta ja Fondumo Esperanto-säätiöltä, ja olisi siis ensimmäinen täysin esperantoksi tehty elokuvaprojekti Suomessa. Iso asia siis, *tre grava projekto!*

Minua pyydettiin mukaan muun muassa läheisen asuinpaikkani vuoksi mutta myös lisäavuksi jo valmiiksi liiton jäsenistä koostuvaan apujoukkoon. Elokuvan käsikirjoituksen käänsi Esperantoliiton kokoama tiimi ja sitä työstettiin ajatuksella. Kyseessä oli siis merkittävä yhteistyö Esperantoliiton ja osaavien elokuva- ja kulttuurialan tekijöiden välillä sekä luonnollisesti merkittävää näkyvyyttä esperanton kielelle.

Itse elokuvan teemat käsittelevät sodan vaikutuksia äiteihin ja lapsiin, perheisiin ja ihmisiin, ja se on sanomaltaan

hyvin ylikansallinen sekä sodan vastainen, nationalismista puhuva. Elokuva kertoo äidistä, joka tapaa toisen äidin ja hänen lapsensa odottamattomassa tilanteessa. Näissä tarinan teemoissa esperanto voi mielestäni olla todella hyvä elokuvan rikastuttaja. Elokuva vaikutti alusta asti todella hyvältä.

Preparadoj – valmistelut

Kyseessä ei ollut ensimmäinen kerta, kun autoin kielen kanssa: Olen auttanut esimerkiksi *Svenska teaternissa* vuonna 2020 eräessä näytelmässä kohtausten kanssa, joissa puhutaan esperantoa. Usein erilaisissa kulttuuriprojekteissa on voinut tarvita apua esimerkiksi muutaman lauseen kanssa. Lähdin siis mielelläni mukaan! Tässä projektissa jännittävää oli juuri se, että kyseessä oli kokonainen lyhytelokuva ja sen maailma, lavasteineen ja lauluineen, esperantoksi. Liiton hallituksen jäsenet osallistuivat aktiivisesti ja antaumuksella projektin tekemiseen ja auttamiseen. Ohjaaja ja luova tiimi olivat hyvin kiinnostuneita kielestä ja kohtelivat sitä kunnioittavasti.

Itse kuvaaminen tapahtui elokuussa, mutta vaati liitolta usean kuukauden ajan ennakkotyötä niin kääntämisessä, viestimässä, asioiden sopimisessa kuin näyttelijöiden harjoittamisessakin. Osallistuin itse muutamaan näyttelijöiden repliikkien etäharjoitukseen sekä yhteen lähiharjoitukseen, joita järjestettiin muutaman viikon ajan heinäkuussa. Ilman näitä Esperantoliiton ja ohjaaja Anna Anderssonin järjestämiä tapaamisia näyttelijöiden totuttaminen esperantonkielisiin repliikkeihin olisi ollut varmasti paljon vaikeampaa. Näyttelijät sekä ohjaaja pääsivät kysymään repliikeistä, kielestä ja sen erilaisista puolista rauhassa. Se ei olisi kuvauspäivinä ollut mahdollista. Elokuvan kohtauksien repliikkejä ja käännöksen vivahteita hiottiin loppuun samanaikaisesti.

Mia rolo kiel helpanto kaj la filmado – auttaminen kuvauksissa ja projektissa

Kuvauspäiviä oli kuusi, joista olin paikalla viitenä päivänä. Sen lisäksi liiton hallituksen jäseniä vieraili kuvauspaikoilla. Näyttelijöiden kanssa esperantosta oli puhuttukin jo paljon ennen kuvauksia, mutta etenkin kuvauspaikalla kaikki olivat kiinnostuneita kielestä. Keskustelua herätti seikka, että puhun äidinkielenäni esperantoa, kun taas muut ovat opetelleet kielen itselleen vieraana kielenä. Itsellenikin kuvauspäivät olivat mielenkiintoisia: en ollut puhunut esperantosta tai kuunnellut sitä tästä näkökulmasta pitkään aikaan, käytänhän sitä lähinnä kotikielenä.

Itse kuvaustiimi oli muutaman kymmenen osaavan ammattilaisen kokoinen ja koostui ohjaajasta, apulaisohjaajista, kuvaustiimistä, leikkaajasta, maskeeraajasta, tuottajasta ja monesta muusta liikkuvasta osasta. Kuvaukset olivat monessa eri paikassa ja leikkauspöydällä nämä kaikki paikat koostetaan yhdeksi, kuvitteelliseksi rakennukseksi ja sen pihamaaksi. Kuvauksissa oli myös monia alan harjoittelijoi-



ta suorittamassa harjoittelua esimerkiksi kouluunsa tai opistoonsa. Kuvauspaikat olivat muun muassa Espoossa, Vantaalla ja Ruotsinpyhtään ruukin läheisyydessä Loviisassa. Ryhmästä ja tausta-aineistoista näki heti, että monet olivat suunnitelleet kuvauksia huolella ja pidemmän aikaa – aikaa ei nimittäin itse kuvauspäivinä ollut hukattavaksi. Siksi olikin hyvä, että esimerkiksi näyttelijät olivat tutustuneet kieleen jo runsaasti ja hyvissä ajoin.

Kuvauspäivät olivat todella antoisia. Tutustuin moneen ammattilaiseen ja mukavaan henkilöön ja pääsin kuulemaan esperantoa aivan uudessa kontekstissa ja käyttöpaikassa. Olin usein läsnä, kun näyttelijöitä maskeerattiin tai puvustettiin, ja kävimme läpi tulevien kohtauksien dialogia ja tunnetta. Näyttelijät kyllä muistivat lausumisen, äänneet ja repliikkinsä varsin hyvin, mutta heitä kiinnosti usein merkitys ja vivahteet käännöksen takana. Kuvauksia ennen olikin hyvä käydä ne, sillä itse kuvaustilanne oli usein intensiivinen.

Kuvaaja, ohjaaja ja apulaisohjaajat pyörittivät kuvaushetkeä ja istuin usein tarpeeksi lähellä, mutta kuitenkin kaukana, jotta kuulisin repliikit. Ottojen jälkeen minulta usein tarkistettiin joko aivan lopuksi, tai välissä jos tuli pidempi tauko, oliko lausuminen ja repliikit niin sanotusti

OK. Muutaman kerran kävin myös merkitsemässä kuvausryhmän jäsenille tai leikkaajalle, mitkä ostoista kuulostivat paremmilta; jos jokin repliikki on paremmin lausuttu kuin toisella kerralla, mutta toisella kerralla näyttelijäntyö on esimerkiksi lähempänä haluttua, voi nämä leikkausprosesissa yhdistää.

Kauttaaltaan olin vakuuttunut työryhmän työskentelystä, ja etenkin näyttelijöiden taidosta näytellä kielellä, joka on ollut vasta pintapuolisesti jonkun aikaa. Päähenkilö Ellaa (*Inkeri Hyvönen*) kuunnellessa viimeisenä päivänä pitkät repliikit kuulostivat mahtavilta, kuin olisin kuunnellut jotakin keskustelua oman perheeni välillä! Lopulta olin läsnä kuvauksissa niin paljon, että autoin jopa kerran esimerkiksi otoksen keston ajastamisessa ja muutaman kerran myös loppusiivouksessa ja lavastuksen roudaamisessa. Olin usein ainoa kuvauksissa, joka ymmärsi sanasta sanaan mistä puhutaan, joten työni ei ainakaan ollut turha!

Elokuvan kuvausten jälkeen auttamista itselläni kertyy ja on kertynyt esimerkiksi elokuvan loppulaulun lausumisen auttamisessa. Kappaleen säveltää ja laulaa artisti *Mikael Saari* ja tuottaa *Kai Poutanen*. Laulun on kääntänyt *Jouko Lindstedt*. Saari säveltää myös lyhytelokuvan musiikin. Sen lisäksi autan elokuvan lopullisessa editointityössä juuri repliikkien tarkistamisessa.

Elokuvan voisi sanoa olevan iso, jopa historiallinen – en itse usko, että koskaan aikaisemmin on tehty puolen tunnin mittaista lyhytelokuvaa, jossa koko maailma on rakennettu esperantoksi, näin isolla tiimillä ja yhteistyössä Esperantoliiton kanssa. Olen satunnaisena kielen käyttäjänä pohtinut sen roolia ja funktiota nykymaailmassa harrastamisen ”lisäksi”. Uskon, että tämänlaisissa kulttuuriprojekteissa sillä voi olla suurikin lopullista teosta tai elokuvaa rikastuttava osa; varsinkin kun kieltä käytetään niin hyvin kuin tässä elokuvassa.

Elokuvassa näyttelivät *Inkeri Hyvönen (Ella)* lisäksi *Tuomas Kiiliäinen (Leo)*, *Anastasia Trizna (Niija)*, *Johanna Kuuva (Ava)* ja *Ilkka Olavi (Max)*, jotka kaikki puhuivat repliikeissään esperantoa. Elokuva saa näillä näkymin ensi-iltaansa alkuvuodesta 2025 ja tulee varmasti näkyviin useassa paikassa. Kannattaa pysyä kuulolla! Kiitos omasta puolesta-ni koko Esperantoliitolle siitä, että sain avustaa projektissa.

Sakari Bister



Ella (Inkeri Hyvönen) kaj Leo (Tuomas Kiiliäinen). Foto: LL.



Päivi kaj Tiina vizitis filmadon dum unu tago. Foto: LL.

Miaj spertoj kaj partopreno en la projekto

Ĉi-somere Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) kontaktis min kaj demandis, ĉu mi volus helpi en projekto. Sed ne estas tute normala projekto; estus la unua profesia filmo farita en Esperanto en Finnlando! La mallonga filmo nomiĝus *Patrinoj* kaj ĝin estis faronta *Riimu Films* kun *Laura Laaksonen* kaj la reĝisoro *Anna Andersson*. Mi komprenis rapide ke estas grava projekto por la lingvo kaj EAF, sed ankaŭ por la filma mondo, do mi volonte helpis. EAF tradukis la scenaron, kaj mia rolo estis helpi en la provludoj kun la aktoroj, kaj dum la filmado aŭskulti ke ĉio iras bone.

En 2020 mi helpis en unu teatraĵo en *Svenska Teatern*, kie la aktoroj devis paroli iomete Esperanton. Miaj spertoj jam tiam estis ke teatraj kaj kulturaj grupoj interesiĝas pri la lingvo kaj povas uzi ĝin en interesaj manieroj. La temoj de la filmo *Patrinoj* estas paco kaj komunikado inter popoloj en tempo de milito. Bonaj temoj fari filmon en Esperanto! La tuta mondo de la filmo, muziko, replikoj kaj eĉ tekstoj sur aĵoj, estas en Esperanto.

Mia rolo en la preparadoj komenciĝis kun la provludoj. EAF jam longe parolis kaj mesaĝis kun Andersson, sed en julio komenciĝis ankaŭ distancaj provludoj (kaj unu en Helsinko) de replikoj kaj prononcado. Estis granda laboro por ĉiuj kaj kompreneble por la aktoroj, sed ĉio iris bone. Mia plej granda rolo kiel helpanto okazis dum la tagoj de la filmado: oni filmis dum du semajnoj kaj mi helpis dum ĉiuj tagoj de filmado, krom unu. Tie mi daŭre helpis la aktorojn, sed ankaŭ babilis kun la tuta filmoteamo pri la lingvo, mia rolo kiel "denaskulo", kaj tiel plu. Estis interese paroli pri la lingvo kaj eĉ uzi ĝin kun novaj homoj post kiam mi havis iom da paŭzo.

La teamo estis ĉirkaŭ dek kvin aŭ dudek homoj, ĉiuj profesiuloj aŭ filmaj studentoj. Oni planis la filmadon bone anticipi, do la tempon oni uzis tre efike. La filmado okazis en multaj lokoj: en *Ruotsinpyhtää*, *Vantaa* kaj *Espoo*. Ĉiuj ĉi lokoj havis belajn domojn kaj malnovajn, belajn filmolokojn (ekzemple unu kelon kun tre speciala atmosfero!). Mia tipa tago estis unue helpi pri la replikoj, aŭskulti la filmadon, kaj poste paroli kun Andersson kaj la aliaj homoj en la grupo inter kaj post la scenoj, kiel ĉio iris. Miaj spertoj dum la tagoj esti tre pozitivaj kaj mi fine helpis fakte en multaj aferoj, en purigado, porto de aferoj kaj kulisoj kaj tiel plu. Ĉiuj estis afablaj kaj agrablaj.

Mi dirus ke pri la lingvo kaj la teksto oni sukcesis – fakte, en multaj scenoj la aktoroj sonis kiel homoj, kiuj parolis la lingvon jam de longe, ne nur kelkajn semajnojn! Preskaŭ ĉiam mi estis la sola persono kiu komprenis tute, pri kio oni parolas, do almenaŭ mi vere ne sentis min malgrava dum la filmado.

Post la filmado mi helpos pri la traduko kaj prononco de unu kanto, kiu aperos en la fina parto de la filmo. Ĝin kantas kaj verkas *Mikael Saari*. La artisto ankaŭ komponas alian muzikon por la filmo. En la traduko helpis mia patro *Jouko Lindstedt*. Krome mi helpos ankaŭ pri la subtekstoj kaj pri la kontrolo de la replikoj por la fina versio. Mi kredas, ke kiam la filmo pretos en la komenco de 2025, estos ĝi bona ekzemplo pri kiel uzi la lingvon en kulturaj projektoj kaj kiel parto de la moderna mondo, ankaŭ por homoj kiuj ne interesiĝas pri lingvoj tiel multe. Mi dankas al la tuta filma teamo kaj al EAF!

Sakari Bister



Niija (Anastasia Trizna). Foto: LL.



Leo (Tuomas Kiiliäinen). Foto: LL.

Steletto ne plu brilas

En marto 2024 la jarkunveno de *Steletto* decidis malfondi la societeton. Pro burokrata proceduro kaj teknikaj malfacilaĵoj la decido realiĝis nur en julio.

Dum 105 jaroj Steletto celkonscie laboris por la bono de viddifektitoj. Steletto naskiĝis en la mondon, disŝiritan pere de milito. Pere de Esperanto oni vastigis la mondon kaj produktis servojn al homoj. En la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj Esperanto funkciis kiel komuna lingvo inter blindul-organizaĵoj. Al Esperanto oni povas atribui la meriton pri funkciigo de la mondovasta kunlaboro inter blinduloj kaj blindul-organizaĵoj. Esperanto konservis sian pozicion precipe kiel peranto de kulturoj.

Vivkondiĉoj kaj aliro al informoj pliboniĝis tiel, ke vid-handikapitoj povas partopreni en Esperanto-movado egalrajte kune kun iliaj vidantaj kamaradoj. La tendenco estas, ke viddifektitoj estos tie, kie aliaj estos. Steletto plenumis sian taskon por antaŭenigi premisojn.

Fragmentoj el la blindula Esperanto-movado

Blinduloj jam frue adoptis Esperanton. La unua blinda esperantisto ek de la jaro 1888 estas la nederlanda s-ro *N. Schildt* (Amsterdamo), sed li ne sukcesis interesigi siajn samsortanojn pri ĝi kaj praktike uzadi la novan lingvon.

La unua persono, kiu havis la ideon feliĉigi la blindulojn per Esperanto, estis f-ino *Zablon d'Her* en *Lyon*, kiu dum la somero de la jaro 1895 instruis pri Esperanto f-inon *Hélène Giroud*, naskiĝintan en Svislando, kiu unue estis nevidanta instruistino kaj poste eĉ direktorino de la privata blindul-lernejo *Villeurbanne* apud Liono. Poste ŝi kun f-ino *Zablon d'Her* instruis kelkajn lernantojn de la nomita instituto sen lernolibroj, ĉar tiam jam ne ekzistis kaj eĉ mankis brajla alfabeto por Esperanto tiutempe.

Esperanto kaj finnaj blinduloj

En la komenco de la pasinta jarcento finnaj blinduloj eksciis pri Esperanto kaj pri la ebleco kontakti eksterlandajn sortofratojn. Tiam fremdaj lingvoj ne apartenis en la lernoplanon de blindul-lernejoj. En la jaro 1909 *Nino Runeberg*, prezidanto de EAF, komencis gvidi Esperanto-kurson en la blindul-lernejo en *Helsinki*. *Yrjö Nummi*, la unua nevidanta samideano inter la finna blindularo en la jaro 1913 komencis du Esperanto-kursojn: unu por svede- kaj alia por finneparolantaj infanoj de la blindulinstituto en *Helsinki*. Poste daŭrigis la kursojn la iame konata Esperanto-pioniro *Vilho Setälä* (1892–1985) tiel bone, ke 15 partoprenintoj ellernis perfekte la lingvon. Samjare la kongreso de finnaj blinduloj laŭ propono de *John Bergh*, finna blinda verkisto kaj fervora samideano, akceptis rezolucion, kiu esprimis la deziron, ke Esperanto estu deviga studobjekto en la finnaj blindulaj lernejoj. En 1914 aperis esperanta-finna vortaro kaj lernolibro por finnoj en la brajla preso.

Esperanta Ligilo (EL)

La unua numero de la brajla revuo *Esperanta Ligilo* aperis en la jaro 1904. Ĝi estis la sola kaj grava informilo kaj unuigilo inter blinduloj en diversaj landoj. Ekde 1999 EL haveb-

las ankaŭ per retroŝto. Dank' al la brajla skribo en Esperanto fariĝis stabila. Steletto subtenis EL finance. En la unuaj numeroj de EL aperis adresaro de la legantoj, por ke ili laŭeble interrilatiĝu.

Estis *Harald Thilander* (1877–1958), blinda, surdeta, kripla junulo loĝanta en hejmo por malfortuloj en *Stockholm*, kiu unue perceptis, kiajn grandajn servojn Esperanto povas fari al la tuta blindularo.

Tio okazis en 1901, kiam nenia dulingva vortaro estis brajle presita, tiel ke estis preskaŭ neeble por blindulo lerni ian lingvon krom la nacia. Thilander, kiu ĉiam revis pri internacia kunlaboro inter blinduloj, por kontraŭstari komunajn obstaklojn pro vidmanko, estis dediĉinta jam naŭ jarojn al tasko terura: kopiadi en brajlan skribon pere de diktado svedajn vortarojn de angla, franca kaj germana lingvoj. Tamen post tiu laboro li havis nur unu ekzempleron de la libro.

En 1913 Harald Thilander fariĝis redaktoro kaj eldonisto de la gazeto. Antaŭ la dua mondmilito dum kvar jaroj aperis kultura gazeto *Nia Mondo*, kiel aldono de EL. Ĝi estis lerte konstruita populara kaj kleriga periodaĵo. Li presis la gazetojn en sia propra presejo en *Stocksund*.

Steletto estiĝas

Jam antaŭ 1914 la Esperanto-movado inter la finnaj blinduloj estis kompare vigla. Kiam multaj partoprenantoj de Esperanto-kursoj en blindul-lernejo forlasis la lernejojn kaj komencis sendependan vivon, inter ili estiĝis penso fondi propran societeton por antaŭenigi porblindulajn aferojn kaj progresigi ŝatokupon de Esperanto. *Anna Friman* invitis 29.5.1919 al ŝia hejmo blindulojn, kiuj loĝis en *Helsinki*. Tiel estiĝis Steletto.

Steletto bonege progresis. Jam en la sekvanta jaro Steletto aranĝis skriban konkurson. La unuan premion gajnis *Varma Järvenpää* (1899–1986) kaj en la jaro 1921 la duan premion. "Steletto regule aranĝis jarkunvenojn, eldonis kompare multajn studlibrojn por Esperanto kaj kantlibron kun melodioj en brajla preso kaj multe propagandis nian lingvon inter nevidantoj. Prave oni povas diri, ke estis finnaj samideanoj, kiuj fondis la unuan nacian societeton de blindaj esperantistoj postmilite.", skribis *Joseph Kreitz*.

Varma Järvenpää translogiĝis al Svedio por fariĝi edzino de Harald Thilander post la morto de lia edzino *Karin* en 1927. Joseph Kreitz tiom trafe foje skribis: "*Venis al li anĝelo el Finnlando, la sindonema, klera, praktika kaj ĉiam ĉarma poetino Varma Järvenpää*". *Varma* naskiĝis la 1-an de majo en 1899, en finnlanda kampara regiono, kie ŝia patro havis terkulturan kaj brutbredan bieneton, elkreskis inter naŭo de gefratoj kaj blindiĝinte fariĝis masaĝisto. Post la morto de Harald Thilander en 1958 *Varma* daŭrigis lian verkon, kiu fariĝis ankaŭ ŝia vivoverko. Ĝis la mezo de la sepdekaj jaroj ŝi daŭre sidis, fine tute sola ĉe la maŝino.

Tri unuaj internaciaj kongresoj de blindaj esperantistoj 1921–1923

La unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazis en Prago, Ĉeĥoslovakio samtempe kun la Universala Kongreso de Esperantistoj. Ĝin partoprenis 58 blinduloj kun



Du blindaj viroj Tanabe Kunio kaj Arvo Karvinen kune kun Krizantemo paŭzis en la japana restoracio de la vendohalo en Helsinki 2003. Japanaj gastoj konatiĝis kun edukado kaj enlaborigo de vidhandikapitoj dum ilia turneo en Svedio kaj Finnlando.



La lastan pozon rigardas Eila kaj Arvo Karvinen, Oili Piippo fotas, Riitta Ekola kaj Raimo Tanskanen.



Studrondo en la "klasĉambro" de Steleto 2006. Dum la jaroj 2005–2009 Raimo Tanskanen gvidis kurtajn Esperanto-kursojn. Kursoj okazis ankaŭ vespere kaj dutagaj kursoj unufoje monate en Helsinki sub gvido de Sylvia Hämäläinen (Tampere); plej laste en *Kouvola*. Parto de studantoj, maldekstre *Gunvor Moilanen*, *Paulina Hannus*, *Arvo Karvinen*, *Liisa Matikainen*, *Matti* kaj *Riitta Ekola*.



Blinda Abdul Salam malkaŝas la sekreton de longa vivo. Unue li staris sur sia kapo, man' en mano en kapo. Arvo Karvinen kaj Riitta Ekola rigardas, en kiu pozo Salam estas. Malantaŭe sidas Oili Piippo. Vilno 2005.



La lasta provludo en *Ullanlinna* dum la Zamenhof-lunĉo de Esperanto-klubo de Helsinki 2009. Steloknaboj de Steleto: maldekstre *Arvo Karvinen*, *Aatu Moilanen*, *Riitta Ekola* kaj *Raimo Tanskanen*.

13 vidantaj gvidantoj. Krom la komisionaj kunvenoj okazis kvar laborkunsidoj de la kongreso, en kiuj estis legitaj atentindaj referatoj kaj faritaj gravaj proponoj pri dudeko da porblindulaj aferoj.

La "dua" en Helsinki

La dua internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazis 1922 en Helsinki, Finnlando, kun 53 partoprenantoj el 12 nacioj. Duono de aliĝintoj ne povis partopreni. Stranga fakto estis, ke ne ĉeestis eĉ unu reprezentanto el la najbaraj landoj Svedujo kaj Norvegujo.

Kiam blinduloj en Prago decidis pri kreo de "universala blindulorganizado esperantista", Finnlando kaj aliaj nordaj landoj havis tiel multe da preteco kaj povoscio, ke en la sekvanta jaro la renkontiĝo de blindaj esperantistoj okazis en Helsinki kiel parto de la Universala Kongreso. En la historio de la juna Finnlando la penso pri aranĝado de internacia kongreso donis al tiatempa blinda junularo bonegan impulson por lerni kaj uzi Esperanton. La projekto vekis grandan entuziasmon. Esperanto estis facile adoptebla kaj la komuna lingvo donis vojon al interkomunikiĝo kun alilandanoj.

La junan societon Steleton atendis granda kaj postulema tasko tuj post la milito. Steleto aranĝis loterion kaj gajnis tiel konsiderindan gajnon, ke loterioj iĝis kutimo. *Kalle Huuskonen* respondecis pri la ekskursoj. Eblis partopreni en trihora krozado sur la arkipelago, viziti en *Korkeasaari*, *Seurasaari* aŭ *Munkkiniemi*. Blinduloj povis sperti saŭnon kaj naĝadon en la insulo *Lauttasaari*, kiu tiatempes estis konata per nomo *Drumsö*.

La kongresa libro de la UK enhavis vortareton pri gravaj parolturnoj en la finna, ekzemple *Olkaa hyvä ja hankkikaa minulle ajuri* aŭ *kantaja. Älä sylje lattialle!*

En Prago estis prezentita ĉefe raportoj pri la situacio de blinduloj en diversaj landoj. En Helsinki la laborordo enhavis nur ĝeneralajn blindulaferojn. Samkiel en Prago, la tempo rezervita por traktado ne sufiĉis. Blinduloj maltrafis la solenan fermon de UK.

En Helsinki blinduloj parolis pri jenaj temoj: Fondiĝo de internacia asocio de blindaj esperantistoj; Materialvendejoj por blindaj metiistoj; Internacia informilo kaj statistikejo; Internacia biblioteko; Internacia komuna muzikskeno; Vojaĝrabatoj por blinduloj; Kunlaboro de blinduloj por fakvortaroj. Inter faritaj referatoj estas citindaj: prof. *Stejskal* pri *Blinduloj kaj alkoholismo*, *Interblindula geedzigo* kaj *Agnes Melchior* pri *Instruado de duonvidaj infanoj*.

1923 Impona salutdonaco de malriĉa Finnlando en Nurenbergo

Al la tria kongreso aliĝis 164 personoj el 21 landoj, sed pro la malfacilaj politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj partoprenis 93 samideanoj kaj 27 viduloj el 13 landoj. Naŭ finnoj partoprenis la trian blindulkongreson, kiu okazis en Nurenbergo. *Suomen Höyrylaivayhtiö* jesis sufiĉe grandan rabaton kaj ankaŭ *Valio* subtenis nian intencon donacante 25 kg da butero por la kongreso.

Skribis Joseph Kreitz: "- neni povas kontesti, ke niaj kongresoj donis multajn konsilojn kaj impulsojn al gvidantoj de la blindularo tiele, ke **jam antaŭ 1939 estis metita la fundamento**, sur kiu post la milito estis konstruata la moderna sociala blindulprizorgado nun aplikata preskaŭ en ĉiuj kulturaj landoj de nia terĝlobo."

En la ombro de la Dua Mondmilito

Dum la milito Steleto havis oficialajn kunvenojn nur dufoje jare, sed Esperanto daŭre vivis. Membroj kunvenis en hejmoj por vivteni Esperanton, kaj estraranoj eĉ bindis mane librojn. En la 1940-aj jaroj okazis kursoj, kiujn gvidis *Oskari Lehtivaara* kaj *Einar Juvonen*. En la jaro 1942 Steletoanoj pasigis someran tagon kaj agrablan vesperon en *Onnela* (*Tuusula*). *Sirkka Lehtivaara* plezurigis ekskursantojn per esperantaj kantoj. Einar Juvonen konstatis en la salutvortoj i.a. "Dum la milito malracie estas paroli pri internacia paco, ĉar post la milito sekvas tempo de rekonstruo. Por tio necesas sin prepari jam nun. Ni devas uzi Esperanton diligente, ĉar post la milito ni havos multe por diskuti kun eksterlandaj samsortanoj kaj esperantistoj." Sekvantan jaron *Esperantopisto* pagis sian prunton al Steleto. Pere de tiu mono Steleto aĉetis novan gramofonon kaj kursodiskojn.

Presplatoj por la bonfaro de patrujo

Dum la milito okazis iaspeca akcidento ĉe la blindullernejo en Helsinki. S-ino *Elna Hannus*, tiama lernejestrino en sia forta patriota entuziasmo, transdonis al rubokolektado la presplatojn, kiuj kuŝis en la subtegmento de la blindullernejo. Tiel malaperis ankaŭ la presplatoj de la vortaroj de Vilho Setälä, kiujn Steleto posedis. Tio evidentiĝis en la jaro 1953, kiam Steleto planis publikigi novan eldonon de la vortaro *Suomi-Esperanto*. Tamen oni konsideris, ke ankaŭ la vortaro *Esperanto-Suomi* estus bezonata. Ĉar ankaŭ la platoj de la paralela libro malaperis, estis tamen decidite presi nur la vortaron Esperanto-Suomi. Ankaŭ ĝi estis tiel ampleksa, ke oni decidis presi nur la vortaron Esperanto-Suomi. Ankaŭ ĝi estis tiel ampleksaj, ke oni decidis fari mallongigitan version de ĝi.

Steleto ricevis permeson pri resumo, kaj *Kaarlo Jokinen* promesis realigi la taskon. Tiel la libro trovis lokon en unu bindaĵo. La nova vortaro aperis en la jaro 1954.

Survoje al pli luma tempo

En la jaro 1945 la vivo iom post iom revenis al pli normala formo. Membroj daŭre studis Esperanton kaj lernomaterialo estis presata. En aprilo 1945 okazis 25-jarfestoj de Steleto. La jaro 1946 estis pli luma. Dormantaj Esperanto-ĵurnaloj komencis aperi regule, someraj kursoj kolektis samideanojn studi la komunan lingvon. Steleto pruntedonis novan gramofonon kaj diskojn al memstare studentaj, kaj membroj kolektiĝis en hejmoj por vivteni la lingvoscion. En la jaro 1946 estris presata "Esperantokurso kaj gramatiko" kaj "Legolibro". Por la somera kurso de Esperanto-instituto en 1947 Steleto ricevis kvin senpagajn lokojn.

En la jaro 1948 okazis tri kursoj kaj en 1949 du, kiujn gvidis Einar Juvonen kaj *Oskari Lehtivaara*. La loterio donis bonan gajnon de 131 761 mk (finnaj markoj).

La 33-an Universalan Kongreson de Esperanto en Svedio (*Malmö*) partoprenis dudeko da blindaj esperantistoj, precipe el Danio, Finnlando, Norvegio kaj Svedio. El Finnlando partoprenis *Wolmar Sjöholm* kaj *Oskari Lehtivaara*. Pro malfacilaĵoj en akiro de pasporto kaj valuto ĉiuj viddifektitaj aliĝintoj ne povis veni, ekz. el Hungario, Italio, Pollando kaj Francio.

Blinduloj havis tri laborkunvenojn, dum kiuj oni parolis pri revivigo de internacia organizo de blindaj esperantistoj kaj fondo de oficejo de korespondado.

Okazis ekskursoj al *Lund* kaj Kopenhago. En Lund kongresanoj vizitis blindullernejon, kiu samtempe funkcias kiel laborejo de blinduloj. En Kopenhago ili konatiĝis kun la agado de la blindulligo en ties sidejo. La dana ligo komencis loki blindulojn labori en fabrikoj. En Kopenhago troviĝas teksejoj, kiuj dungas blindulon. En serurfabriko laboras 15 blinduloj, nur la direktoro kaj oficisto estas viduloj.

En blindullernejo Kopenhago troviĝas balosalono, kie oni instruas dancadon, ĉar estas konsiderata ke dancoj apartenas al la eduko de moderna homo.

Verŝajne pro la malgranda nombro de partoprenantoj, la kunveno ne estis taksata kiel internacia kongreso de blinduloj.

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) 1951

La 19-a IKBE okazis en Munkeno, Germanio kun 66 partoprenantoj el 14 landoj. Blinduloj estis gastoj de la bavaria blindulligo kaj loĝis en la domo por studentoj de la munkena universitato. Tio estis ege oportuna aranĝo, ĉar la kongresejo de la Universala Kongreso estis tute apude, en la munkena universitata domo.

La plej grava atingo de la kongreso estis, ke la statutpropono de la statutkomisiono estis aprobita kaj sekve fondita LIBE. Oskari Lehtivaara (1903–1962) agis kiel ĝenerala sekretario de LIBE 1951–1962. *Arvo Karvinen* (1934–2003) estis estrarano 1963–1968. La Ĝenerala Asembleo en *Muszyzna* (Pollando) elektis Arvo Karvinen kiel novan prezidanton por la periodo 2009–2013, sed ekde 2012 li laboris kiel vicprezidanto kaj lian antaŭan postenon okupis s-ino *Nedeljka Ložajić* (Serbio).

Esperanto anstataŭ latino en ekzamenoj

Dum la lernoperiodo 1956–1959 *Helsingin Yksityislyseo* ricevis la rajton inkludi Esperanton kiel oficialan ekzamenon. Tiam tie studis liceanoj Arvo Karvinen, *Aatu Moilanen* kaj *Raimo Tanskanen*. Laŭ la studplano ili estus devigitaj trapasi ekzamenon de la latina lingvo. Ili petis permeson ekzameniĝi pri Esperanto. La ekzamenon akceptis Vilho Setälä, kies lernolibrojn ili studis. Ĉiuj tri daŭrigis studojn vespere. Aatu Moilanen (1934-) eĉ disertis pri pedagogio, kiel pensiulo en la jaro 2006. Li estas la unua kaj sola plene blinda, kiu atingis la plej altan universitatan gradon.

Alia evento en Esperantujo estas, ke en la jaro 1963 Esperanto estis la unuan fojon universitata lernofako en la Somera Universitato en *Lappeenranta*. Tie troviĝis precipe studantoj de mastrumadscienco. Por ili Esperantokurso kaj ekzameno estis devigaj por atingi universitatan gradon *cum laude*. Troviĝis ankaŭ multe da homoj, kiuj partoprenis Esperantokurson por sia propra plezuro.

Blinduloj kongresis en Tuusula 1969

IKBE okazis en la kadro de la 54-a UK en *Otaniemi*. IKBE havis 105 partoprenantojn el 14 landoj; aliĝis 130 el 17 landoj. La reprezentantoj el Sovet-Unio, Jugoslavio kaj Sudafriko ne povis veni.

Antaŭ la kongreso okazis renkontiĝo en Kuopio kaj *Raitalampi* kun partoprenantoj el dek landoj. Temoj de prelegoj:

Rekapabligo de blinduloj en Finnlando, *Kaarlo Virkki*

Ĉu Esperanto havos estontecon? *Martin Meyer*, Svislando

Unuiĝo eŭropa de blindaj laboruloj, Francio

Elstaraj blindaj virinoj, *Rudolf Krchňák*, Ĉeĥoslovakio/Ĉeĥio

Ferihejmoj de blinduloj en Finnlando, *Raimo Tanskanen*
Debato: Esperanto – aŭ ideologio aŭ praktika instrumento?

Okazis vizito en la rekapabligha centro en *Tyyskylä* en *Siuntio* kaj en la kurso por surdbinduloj, ekskurso al *Hämeenlinna*, kie estis ŝipveturado kaj lunĉo, en *Rajamäki* konatiĝo kun fabriko de *Hellas-Piano* kaj regalita vespermanĝo.

La 50-jara jubileo de Steleto okazis en la blindula feria hejmo en Tuusula, Magistro Vilho Setälä, honora membro de Steleto, parolis pri Kalevala.

Sur la sojlo de nova jarmilo

En la komenco de la 1990-aj jaroj la komputila komunikado iĝas konata ankaŭ inter viddifektitoj. En la februara



IKBE en Pollando (*Muszyzna*) 2009. Sylvia Hämäläinen helpas kongresanojn ricevi salubran dozon de inhalo en abelujo. Baldaŭ la kapo de Riitta Ekola eniras en abelujon.



Zigzag-krozado sur *Poprad*-rivero, landlimo de Slovakio kaj Pollando, estis refreŝiga paŭzo dum la varmega sudo.

numero de *Esperanta Ligilo* (EL) de la jaro 1992 aperas artikoloj pri elektronika ĵurnalo por blinduloj kaj tradukkomputilo ankaŭ por Esperanto. La numero 1/1996 sciiĝis pri komputila komunikado de nevidantoj. Iom post iom komputiloj kaj informadiko iĝas alireblaj por viddifektitoj. Retpoŝto rapidigas kontaktojn kaj efikigas administradon de asocioj. La preskaŭ centjara EL ricevas paralelan eldonformon. Krom en brajlo EL haveblas ankaŭ per retpoŝto ekde 1999.

Moderna sonregistra kaj prestekniko ebligas produktadon de lernomaterialoj en formo oportuna por viddifektitoj. Tiel viddifektitaj studentoj povas partopreni ĝeneralajn lingvokursojn kune kun vidantaj kamaradoj.

LIBE sin prezentas en publika kunveno de UK, escepte en 1992 (Aŭstrio) kaj 1997 (Aŭstralio).

Japana Esperanto-Asocio de Blindaj Esperantistoj (JABE) membriĝas en LIBE en la jaro 1996, kaj japanaj viddifektitoj komencas regule partopreni en IKBE-oj. En la kongreso en Vilno (2005) la japana delegacio eĉ estas la plej granda.

Esperanto estas unuan fojon unu el la laborlingvoj en internacia seminario (1997) en *Solsana / Saanen*, Svislando: "Internacia lingvo - bazo al interpretado". Artikolo pri ĝi aperis en Esperanto/UEA/Faka agado "Sekvu la blindulan ekzemplon".

La interreto ofertas ankaŭ forumon por diskutado. En Ĉeĥio ekde 1998 funkcias retkonferenco, kie estas uzata nur Esperanto kaj ĝi estas malferma al ĉiuj landoj. LIBE-anoj ĝin vizitadas kaj sendas kontribuojn.

Preparlaboroj komenciĝas por IKBE en Finnlando

Dum la UK en Valencio 1993 dudek blinduloj pritraktis aktualajn aferojn. En la kunveno Arvo Karvinen prezentis inviton veni al Finnlando en 1995 por partopreni IKBE-on, kiu okazos antaŭ la UK en Tampere. Arvo Karvinen estis ankaŭ membro de la organiza komitato de UK.

IKBE en Kaŭkazo

En la jaro 1994 la blindula kongreso okazis en la Rusia *Kislovodsk*, Norda Kaŭkazo. Kaŭkazo disigas Eŭropon de la Oriento, Kristanismo de Islamo. La temo de la kongreso estis "Brajlo - nuntempe kaj estontece!". La rezolucio forte rekomendas, ke internaciaj blindulorganizaĵoj kaj Internacia Poŝta Unio insistu ĉe la ŝtatmembroj kaj aliaj ŝtatoj, ke la poŝtaj reguloj estu senrezerve ĉie kaj ĉiam observataj rilate la paperajn brajlaĵojn, ke estu samrajtigataj kun brajlaĵoj: kasedaj komputildisketaĵoj kaj gazetoj por blinduloj, sen doganaj kaj aliaj impostoj kaj sen prokrastado.

Fakaj prelegoj prezentis edukadon de masaĝistoj en *Kislovodsk* kaj agadon de blinduloj en la regiono *Stavropol*. *Harald Rader* parolis pri sia 40-jara laboro kiel stenografisto en la parlamento de Aŭstrio.

Aliaj diskutitaj temoj estis: libroservo de LIBE, membriĝo en eŭropa blindul-unuiĝo (EBU) kaj tutmonda blindul-unuiĝo (WBU) kaj kiel akiri pli da junuloj al la Esperantomovado, ekz. en junulara Esperanto-renkontiĝo en la kadro de la festivalo "Blankaj noktoj", kiu okazas somere en Sankt-Peterburgo.

IKBE en Tuusula 1995

Tuusula allogis 81 partoprenantojn el 20 landoj. La ĉeftemoj

estis "Vidhandikapitoj en la socio" kaj "Kiel ni povas antaŭenigi partoprenon de viddifektitoj en la socion?" La temoj de prelegoj estis:

Vidhandikapitoj en la socio, *Otto Prytz*, Norvegio

Pri sintenoj rilate al handikapo kaj handikapuloj, Arvo Karvinen

Konsidero al la handikapuloj en la konstrua kaj komunuma planado, s-ino *Maija Könkkölä*, arkitekto

Profesie laborantaj blinduloj, ĉu jam baldaŭ historio?, *Theodor Speckmann*, Germanio

Vidhandikapito kiel konsumanto, *Birger Vigger*, Svedio

La situacio de vidhandikapitoj en Ĉeĉenio, *Pavel Rjabov*, Rusio

La elektronika gazeto por vidhandikapitoj, *Eero Vartio*

Pri interkomunikiĝo, *Anna Rabec*, Rusio

Kiel trovi novan sangon?, *Martin Meyer*, Svislando

En ekzameno de UEA/ILEI – la unuan fojon dum IKBE – ekzameniĝis ses partoprenantoj.

La kongresa rezolucio enhavas rekomendojn al LIBE pri praktika taŭgeco de Esperanto kiel komunikilo. La kongresa resumo enhavanta la prelegojn kaj la rezolucion estis sendita al UEA kaj EAF.

La adiaŭa vespero estis samtempe malfruiĝinta 75-a datreveno de Steleto. La festparolanto *Sakari Kauppinen*, prezidanto de Esperanto-Klubo de Helsinko, en sia parolo tuŝis i.a. la lingvopolitikon de Eŭropa unio kaj konstatis, ke ankaŭ LIBE povus pli bone labori por garantii la pluvivon de nia Esperanto-komunumo. La mesaĝo de *Sakari Kauppinen* estis: Uzu vian instrumenton! Spertu la miraklon de Esperanto! Tio estas miraklo, pri kio indas esti ĝojaj kaj fieraj.

Post la kongreso 44 IKBE-anoj veturis kune al Tampere por partopreni en UK.

Nova jarmilo

En la komenco de la nova jarmilo la agadkampo de LIBE etendiĝas. Esperanto kaj la agado de LIBE iĝas konataj vaste en la mondo pere de EBU (Eŭropa Blindul-unuiĝo), WBU (Tutmonda Blindul-unuiĝo) kaj ICEVI, internacia konsilantaro por eduko de viddifektitoj (International Council for Education of People with Visual Impairment).

Kunlaboro kun ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) estis iniciata. La unua konkreta rezulto estis, ke ankaŭ viddifektitoj estas bonvenaj partopreni Someran Esperanto-Studadon (SES 2010) en Slovakio (*Piešťany*). Tie tri finnaj studantoj uzis la brajligitan finnan eldonon de la lernolibro "Esperanto per rekta metodo" de *Stano Marček*.

Somere 2011 LIBE brajligis la internacian version de la supre citita lernolibro.

Viddifektitoj povas kontakti la Konsultejon de la Akademio de Esperanto ankaŭ brajle. En aŭtuno 2004 *Otto Prytz* (Norvegio) elektiĝis membro de tiu grupo, kies tasko estas gardi la kvaliton de la internacia lingvo.

Dank'al Interreto LIBE videblas pli vaste ol antaŭe.

Intereso al Esperanto vekiĝas inter la viddifektitoj en Sud-Ameriko, Afriko kaj Azio.

Eŭropa Unio informas esperante dum la jaro 2006.

En la voĉbabilejo "Ventrilo" funkcias Esperanto-rondeto ekde la jaro 2009.

Kunlaboro kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) komenciĝas.

Tri IKBE-oj (2003, 2005, 2011) realiĝis pere de eksterlanda asistado.

Gotenburgo (Svedio) 2003

Arvo Karvinen kaj Otto Prytz (Norvegio) kune kun svedaj amikoj asistis en la preparlaboroj. La temo de la kongreso estis "Nova informadiko, sanĉo por la neŭtrala lingvo Esperanto" kaj "Egaleco de virinoj kaj viroj". Ĉeestis 44 partoprenantoj el 12 landoj; la plej foraj 12 venis el Japanio.

Vilnius/Vilno (Litovio) 2005

La kongresa temo estis "Modernigo de esperanta materialo". Ĉeestis 90 partoprenantoj el 12 landoj; el Japanio 12.

Ĉar en Litovio ne ekzistas organizita Esperanto-movado inter viddifektitoj, la Ĝenerala Asembleo de LIBE okazinta en Beogrado 2004 petis Arvo Karvinen funkciigi preparlaborojn por la blindula kongreso en Vilno. La mandato kaŭzis viglan korespondadon kaj vojaĝon en 2004 por konatiĝi kun eblaj lokoj por kunvenoj kaj tranoktado. Li ankaŭ starigis studgrupojn en blindulleernejoj en Vilno kaj Tartu (Estonio). Steleto helpis pri havigo de lernomaterialo.

La Litova Esperanto-Asocio kaj blindul-asocio kunhelpis, ke la blindula kongreso okazis en Vilno tuj post la UK. Rimarkinde estas, ke la litova blindulorganizo nomumis s-inon *Audrone (Audra) Juotzenaite*, kiel membron de la organiza komitato de la kongreso. Audra estas ĉefo, kiu prizorgas internaciajn aferojn de la blindulorganizo.

La kongresan temon enkondukis Arvo Karvinen kaj *Antun Kovač* (Kroatio). La kongreso decidis starigi laborgrupon por modernigi la maljuniĝantan esperantan materialon por internacia uzo. Kiel prezidanto estis elektita *Anatoli Maseno* el Kislovodsk (Rusio). Li kunvokos specialistojn pri instruado kaj komunikado partopreni en la laborgrupo.

La limerikisto Otto Prytz, kiel kutime tre trafte kaptis la esencon de la kongreso jene:

En Vilno la IKBE sukcesis.

La stabo per helpemo impresis,

ĝi sperton ne havis,

sed tio ne gravis,

ĉar Arvo konsili ne ĉesis.

Olomouc (Ĉeĥio) 2011

La kongresa temo estis "Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj" kaj ĝi allogis 50 partoprenantojn el 12 landoj.

Arvo Karvinen agis skribe kiel spertulo en la kongresa komitato. Li ne povis vojaĝi. Aranĝantoj petegis kaj Arvo petegis, ke Ritva Sabelli partoprenu en la kongreso. Ŝi vojaĝis sola. Referato pri la kongreso aperis en Esperantolehti 4/2011, "Esperanto kaj alirebla kulturo por blinduloj".

Balatonlelle (Hungario) 2002

La Kongresa temo estis "Kaŭzoj de blindeco hodiaŭ". Ĉeestis 93 partoprenantoj el 16 landoj.

Arvo Karvinen prelegis pri "Kaŭzoj de blindeco en Finnlando". Lia referato kun rubriko "Kiel vivi malgraŭ blindeco" superis la novaĵojlon en Finnlando. (Referato aperis en Esperantolehti 5/2002.)

La Internacia konferenco "Profesia klerigo de viddifektitoj – problemoj, spertoj, perspektivoj" en Moskvo, oktobro 2003

La rusa edukministerio, rusa blindulorganizo VOC kaj kelkaj aliaj lokaj societoj aranĝis konferencon pri profesia edukado de viddifektitoj okaze de la Eŭropa jaro de handikapuloj. Laborlingvoj estis la rusa, angla kaj Esperanto. Ĉeestis 138 partoprenantoj.

Arvo Karvinen prelegis Esperante pri perspektivoj de speciala profesia edukado en Finnlando. Lian paroladon interpretis Anatolij Masenko, konata personeco en la Esperantomovado de vidhandikapitoj.

Seminario pri profesia edukado kaj enlaborigo de vidhandikapitoj en Tokio kaj UK Jokohamo 2007

Referato aperis en Esperantolehti 5/2007 sub la rubriko "Esperanto disvastigas en Azio".

Eŭropa Blindul-unuiĝo (EBU) 2011

Arvo Karvinen estis invitita al la Ĝenerala Asembleo de EBU en Danio (*Fredericia*) en oktobro 2011. Li havis eblecon mallonge paroli pri Esperanto, pri kongresoj, speciale pri la planata kongreso en Ukrainio en la jaro 2012. Lia resumo de la asembleo aperis en Esperanta Ligilo 6/2011.

Du internaciaj kongresoj en Lahti 2019

Referato pri ĝi aperis en Esperantolehti 4/2019.

Esperanto kiel peranto de servoj en studado kaj okupo

Kazuko Kikusima ("Krizantemo") estas en Esperantujo konata libera ĵurnalistino, kiu profitas Esperanton en siaj projektoj. En la jaro 1995 ŝi intervjuis blindajn integre studentajn junulojn kaj instruistojn. Arvo Karvinen kaj Aatu Moilanen interpretis.

En la jaro 2003 Krizantemo kaj la blinda esperantisto *Kunio Tanabe* rondveturis en Nordaj landoj kaj vizitis Finnlandon por konatiĝi kun la edukado kaj enlaborigo de viddifektitoj. Kunio Tanabe estas lernejestro de rekapabligha centro en Tokio. La gastoj volis ankaŭ viziti familion, en kiu ambaŭ gepatroj estas blindaj. Tiel okazis kaj ankaŭ vojaĝo al Estonio por konatiĝi kun la oficejo de *Pimedate Liit* en Tallinn kaj renkonti viddifektitajn esperantistojn. Arvo Karvinen interpretis.

En decembro 2003 Arvo Karvinen intervjuis en Italio du blindajn esperantistojn pri iliaj laboroj en ordinaraj lernejoj.

En la jaro 2005 post la IKBE-kongreso en Litovio dek japanoj tranoktis en *Iris*-centro kaj konatiĝis kun la agado de finna ligo de viddifektitoj. La vendejo de helpiloj ricevis bonajn klientojn. La grupo aranĝis malferman prezentadon de japanaj kostumoj. Krizantemo vestis pupojn kaj klarigis la detalojn esperante. Ankaŭ tiam Arvo Karvinen interpretis. Foje li petis helpon pri virinaj subvestoj, kiujn li ne konas. Esperantistoj inter la ridanta publiko tuj helpis. Ĉeestantoj povis vesti sin en *jukata*. Post promenado en la urbo gastoj pasigis belan vesperon en la ĝardeno de Arvo kaj *Eila Karvinen* ĉe tablo kun frandaĵoj. La lastan vesperon niaj gastoj regaligis la triopon Arvo, Eila kaj Ritva en *Kabuki*-restoracio.

En la jaro 2006 Krizantemo kune kun tri japanaj specialistoj pri normigo vizitis la *Iris*-centron por konatiĝi kun ĝiaj

servoj kaj por prezenti japanajn projektojn. Diskutojn interpretis Arvo Karvinen.

En aŭtuno 2008 laŭ peto de Kunio Tanabe Arvo Karvinen aranĝis por 23 japanaj specialistoj pri difektitoj konatiĝon kun la *Arla*-instituto, *Lyhty ry* (laborejo de invalidoj) kaj servo- kaj agadcentro.

En la jaro 2016 ĉeĥa esploristo turnis sin al Esperanto-asocioj en pluraj landoj. Ankaŭ Steleto ricevis la enketon. Docento *Jaroslav Matuška* ĉe la universitato de *Pardubice* preparis publikajon pri forigo de obstakloj en trafiko. Lia demando estis: Kiuj estas konsiderataj moviĝlimigitaj kaj kiu leĝo difinas invalidecon? Steleto informis la enhavon de la valida leĝo kaj konstatis, ke en Finnlando ĝuste tiam la enhavo de la leĝoj pri sociala- kaj sanservakampo troviĝas survoje al modifoj. Lige kun la projekto estos renovigata la leĝdonado pri handicapuloj kunigante apartajn leĝojn pri invalideco.

El letero de Krizantemo 31.10.2019

-”Mi kelkfoje partoprenis en IKBE (la unuafoja estis en 1995 en Finnlando) por mia esplorado pri la socia politiko por handicapuloj, aparte vidhandikapuloj.

Kaj mi esperas, ke en mia venonta vizito kun la ĉefa celo esplori diplomatian dokumenton pri *Eroŝenko* en aŭgusto 1922, aldone mi havos tempon intervjui *Atominon* [*Anneli Hansen*] detale pri ŝia sperto kiel nokta fleganto por malsana-

nuloj, ĉar ĝuste la informo pri tia delikata servo estas bezonata en Japanio.”

Socia pozicio de virinoj en Japanio

Antaŭ kelka tempo en Japanio vekigis granda debato pri divorco kaj la peniga situacio de virinoj kaj infanoj. Krizantemo kaptis la okazon por kolekti informojn el aliaj landoj pere de esperantistoj. Alvenis al Steleto peto pri leĝdonado kune kun indicoj por ke ŝi aranĝu tradukadon al la japana lingvo.

Omaĝo al Steleto

En septembro *Näkövammaisten Kulttuuripalvelu* honoris la laboron de malfondita Steleto invitante privatulojn partopreni en ekskurson al Porvoo. Krom vidindaĵoj kaj lunĉo la programo konsistis el prelego de *D-ro Saara Kauppinen* pri *Potenco de la lingvo*. La prezidanto de *Kulttuuripalvelu Timo Kuoppala* kaj *D-ro Kari Huuskonen* (blindulmuzeo) rakontis pri la agado de Steleto. *Jouni Lehtivaara* rakontis pri spertoj kiel asistanto de siaj blindaj gepatroj.

Mi estas feliĉa kaj dankema pro la 30 jaroj, kiujn mi kunvivis en la Esperanta blindula mondo. Multon mi lernis kaj spertis. Steleto estingiĝis, sed personaj kontaktoj inter esperantistoj daŭras. Fortojn kaj entuziasmon al la legantoj de Esperantolehti!

Ritva Sabelli



Arvo Karvinen kaj Nedeljka Ložajić (Serbio) konatiĝis kun memdefendo dum la somera Esperanto-kurso en Slovakio (Piesťany) 2010.



Krizantemo vestas s-inon *Annuli Perheentupa* jpane kiel danko pro tio, ke *Annuli* kaj *Teemu* libervole prizorgis transportojn de pupoj al IKBE en Lahti 2019.



Aütunaj Tagoj en Iisalmi – Iisalmen syyspäivät 13.–15.9.2024

Iisalmen syyspäivillä oli lähes neljäkymmentä osallistujaa eri puolilta Suomea. Ohjelma Iisalmessa keskittyi lauantaille ja sunnuntaille, mutta monet saapuivat jo perjantaina.

Sateinen sää lauantaina ei häirinnyt, koska vierailukohteen olivat *Olvin panimomuseo* ja *Luontomuseo*, välissä lounas ravintola *Raatihuoneella*. Illalla kokoontuimme *Kulttuuritalolle* juhlimaan 50-vuotiaista Iisalmen Esperantoklubia, jolle onnittelupuheen *piti Osmo Buller*.

Juhlaillallisen kakkukahvien jälkeen vuorossa oli kahden artistin konsertti, avoin myös muille kuin juhliin osallistujille. Ensin esiintyi kanneltaja *Timo Väänänen*, jonka taianomainen kanteleen soitto vei meidät mukanaan jopa vuosisatojen taakse. Timo kertoi soittamistaan instrumenteista ja valitsemistaan musiikkikappaleista sekä esperantoksi että suomeksi.

Väliajan jälkeen liettualainen muusikko *Edgaras* viihdytti meitä aivan erityyppisellä musiikilla; hänen instrumenttinsa olivat viulu ja kitara, joita hän joissain kappaleissa soitti yhtäaikaan. Taustalla pyörivät erilaiset videot, joissa näimme myös hänen muusikkovanhempansa *Jelenan* ja *Edvardasin*.

Sunnuntain retki vei meidät tilauslinja-autolla *Lapinlahdelle*. Vierailimme yli 200 lehmän navetassa, jossa maatilan omistajat kertoivat meille miten nykyaikainen maidontuotanto toimii. Elämiä suojataksemme pukeuduimme suoja-

haalareihin (kuvassa) ja katselimme vapaana liikkuvia lemmiä navetan parvelta. Ei siis ollut mahdollista silittää tai raputtaa niitä.

Toinen vierailukohtemme oli *Taidemuseo Emil*, jossa tutustuimme Halosen taiteilijasukuun. Saimme mielenkiintoista lisätietoa *Pekka Halosen* sukujuurista Lapinlahdelta. Pekka Halonen on sukunsa tunnetuin taiteilija, mutta osoittautui, että suvussa oli useita lahjakkaita jäseniä. Ennen lounasta piipahdimme vielä oppaan johdolla vanhassa navetassa, joka oli muutettu näyttelytilaksi ja museoksi.

Buffet-lounas nautittiin ravintolassa *Matin ja Liisan asema* ja sen jälkeen meidät kuljettiin nykyiselle Lapinlahden asemalle. Siellä suurin osa nousi Pieksämäelle menevään junaan, muut palasivat bussilla takaisin Iisalmeen.

Iisalmen Sanomien perjantain numerossa ilmestyi monipuolinen artikkeli klubin toiminnasta ja esperantosta yleensä. Lehden kuvassa olivat klubin aktiivit, puheenjohtaja Onni Kauppista oli haastateltu erityisesti. Suomen Esperantoliitto kiittää Iisalmen Esperantoklubia monipuolisesta ohjelmasta syyspäivillä ja toivottaa vielä kerran onnea juhluunna. *Koran dankon!*

Raportis
Tiina Oittinen,
sekretario de EAF

Aütunaj Tagoj en Iisalmi – Iisalmen syyspäivät 13.–15.9.2024



Arpád ja Sarolta Csányi ja Esperanto-roll-up. Kuva AV.



Edgaras soittaa kitaraa ja viulua. Kuva AV.



Ovilla väkeä. Kuva AV.



Olvi-museo, ota Olvia. Kuva JM.



Olvin oppaat. Kuva AV.



Maatilan isäntäväki. Kuva RP.

Aütunaj Tagoj en Iisalmi – Iisalmen syyspäivät 13.–15.9.2024



Luontomuseon opas. Kuva AV.



Taidemuseo Eemil. Kuva JM.



Onni "Feliĉo" Kauppinen ja roll-up. Kuva AV.



Onni aloitti juhlakakun. Kuva AV.



Juhlakakku. Kuva AV.



Timo Väänänen ja kantele. Kuva AV.

Esperanta evento en Savonio

Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) kaj la Esperantoklubo de la urbo *Iisalmi* aranĝis riĉan programon por la Aŭtunaj Tagoj en "Alta Savonio", kiel la regionon difinas *Giorgio Silfer* en sia gratulo pro la 50-jariĝo de la E-klubo de Iisalmi. Giorgio Silfer kaj *Perla Martinelli* siatempe loĝis en Iisalmi instruante lingvojn, i.a. Esperanton, en la loka Civitana Instituto. Ili amikiĝis kun la loka kulturpersono *Reino Eriksson*, aŭtoro kaj rektoro en la Instituto. Bedaŭrinde Eriksson jam junie grave malsaniĝis kaj ne povis partopreni en la jubilea aranĝo, sed gazet-eltondaĵojn pri lia forta agado oni povis vidi en la dosiero de la E-klubo de Iisalmi, kune kun gratuloj kaj fotoj.

La evento kunvenigis kvardekon de esperantistoj, inter ili kelkaj devenintaj de aliaj landoj. Multaj partoprenantoj tranoktis en la hotelo *Golden Dome*, kiu antaŭe estis konata kiel *Evakkokeskus* (Kulturcentro por ortodoksa, karelia kulturo de la evakuitoj). Komence en tie troviĝis ikonoj kaj miniaturaj modeloj pri ortodoksaj preĝejoj en Karelio. Tiujn oni poste translokis en la ortodoksan muzeon *Riisa* en *Kuopio*. Por la ora kupolo sur la tegmento de la nuna hotelo kareliaj virinoj dum jaroj kolektis monon vendante siajn bakitajn frandaĵojn. Sur la menuo de la hotelo daŭre troviĝas tradiciaj *kareliaj pirogoj* kun rizo kaj ovaĵo sur maldika sekala subaĵo.

La programo de la Aŭtunaj Tagoj inkludis ekskursojn: sabbaton en Iisalmi okazis vizito al Naturmuzeo kaj al muzeo de la bierfarejo *Olvi*, kiu nuntempe produktas pli ol 800 milionojn da litroj de biero po jaro. En dimanĉo okazis vizito en *Lapinlahti* al bovinejo de juna entreprenisto, kiu kun siaj edzino,

kvar infanoj kaj 210 bovinoj produktas laktaĵojn. Sekvis vizito en la muzeo de la artistaj fratoj *Halonen*, kiuj iĝis pentristoj, skulptistoj, muzikisto, aktoro, kunkreskintaj en savonia pastora kulturfamilio en la 19-a kaj 20-a jc. Poste okazis ankaŭ konatiĝo al la apuda hejmregiona muzeo. La nomo Lapinlahti malkovras ke "laponoj", nun nomataj sameoj, loĝis en Savonio antaŭ la nuna tempo.

En sabato-vespero post la Jubilea festomanĝo *parolis Osmo Buller*. En la jubileo de la 50-jara Esperanto-klubo de Iisalmi oni gratulis la klubanojn kaj konatiĝis i.a. kun ilia memordosiero, interparolis kun samtablanoj kaj amikoj, fotadis ktp. La vespera koncerto estis malferma al ĉiuj, ĉu esperantistoj aŭ ne. La fama finna kantelisto *Timo Väänänen* ludis diversajn kanteleojn kaj parolis pri ilia deveno. La litova muzikisto *Edgaras* violonludis, gitarludis, prezentis videojn, ekzemple pri la kongresoj de UEA en diversaj kontinentoj. Li ankaŭ uzis la interreton por akompanigi sin per sia propra muziko antaŭe ie ludita. Edgaras jam kiel knabeto violonludis en la Kongreso de UEA en Tampere en 1995. Li estas filo de *Jelena* kaj *Edvardas* en la multlingva ensemblo *Sepa & Asorti*. Nek li nek la kantelisto Väänänen bezonis interpretiston, ĉar ili ambaŭ posedas Esperanton.

La Aŭtunaj Tagoj de EAF montris al la partoprenantoj kaj alia publiko riĉan esperantismon, kiu vivas eĉ je grandaj distancoj de metropoloj kaj ĉefurboj. Oni nur devas trovi ĝin.

Raita Pyhälä

Saluto de Giorgio Silfer

Saluto al la jubileanta Esperanto-Klubo de Iisalmi

Estimata Prezidanto, estimataj Aŭtoritatoj, karaj geamikoj,

Ĉu okazis al vi ke, vivante en relative granda urbo, vi malkovras proksiman urbeton kiu fine plaĉas pli multe, kaj eĉ pli influas vian vivon ol vi estus imaginta? Al mi tio okazis ofte. Retroirante en mia vivo: en Svislando, mi loĝas en *La Chaux-de-Fonds*, sed enamiĝis al la najbara *Le Locle*; en Italio, mi loĝis en Milano, sed ŝatis *Pavia*; kaj tiel plu ĝis kiam, en Finnlando, mi alvenis al *Kuopio*, sed rapide preferis *Iisalmi*.

Mi ne malkovrus Idensalmon se ne ekzistus esperanto-klubo, tiam prezidata de rektoro *Reino Eriksson*. Danke al renkonto kun li en 1975, ekis tri-jara restado en tiu ĉarma urbeto, kie mi instruis esperanton, la italan, la hispanan, la francan, kunigitajn sub la slogano "Aurinkokielet", ĉar kuplitajn al la ideo de libertempaj, multe pli ol profesiaj vojaĝoj.

La diversaj klasoj komprenigis ke lingvoj estas teritorio precipe de virinoj. Nur unu-du viroj lernemis la italan aŭ la hispanan, iom pli la francan; la plejmulto ĉiam estis sinjorinoj. Sed por esperanto la proporcio inversiĝis: viroj plimultis. Tio ripetiĝas ankaŭ en aliaj landoj: eĉ kiel studento, en la lingva fakultato mi trovis precipe virinojn; sed inverse en miaj libervolaj kursoj pri esperanto. La klarigo povas esti tre simpla: oni lernas lingvojn pro multaj kialoj, kulturaj turismaj profesiaj personaj, sed por elekti esperanton necesas geopolitika argumentado; kaj tiu argumentado altiras la atenton de viroj pli ol virinoj.

Tial la esperanta popolo konsistas plejparte el viroj, en proporcio de du kontraŭ unu. Ankaŭ vian jubileantan esperanto-klubon prezidas viro, kaj ĉi tiun saluton tradukis viro, kaj la festparoladon vi konfidis al viro.

Kiam mi loĝis en Idensalmo, apenaŭ ekzistis enmigrintoj: fremdulo estis raraĵo, eventuale interesa. Eĉ ne ekzistis kurso pri la finna por enmigrintoj. Lerni lingvon signifis strebi al kontakto kun eksterlando. Hodiaŭ ni vivas en alia kunteksto, kie la prioritaton en lingvoinstruado havas la finna por enmigrintoj kaj rifuĝintoj. Oni pensas pri lingvolernado por integriĝi envenintojn, pli ol por vojaĝi eksterlanden, kaj multe pli ol por ĝui literaturon en la originalo, kiel ankoraŭ okazis antaŭ jardekoj, se ne jarcento.

La informado pri esperanto devas konsideri ĉi tiun novan konjunkturon, kaj valorigi ne nur la facilecon de la gramatiko, sed ankaŭ la gravecon de la interkulturaj demandoj. Kion tio signifas? Tio ne signifas blufi per falsa propagando, ekzemple prediki ke "La esperantista komunumo, bazita sur principoj de interkompreniĝo kaj respekto, prezentas modelon por paca kunekzistado kaj konflikto-solvado." Ni ne prezentas tian modelon: sufiĉas rigardi al la kvereloj kiuj de ĉiam karakterizas tiun komunumon. Sed ni prezentas alian modelon: ni estas komunumo kiu konscias pri interkulturaj demandoj, pri problemaj situacioj inter diversaj kulturoj. Anstataŭ aplombi pri falsa realo, anstataŭ preskribi la realon, ni priskribu ĝin: ni estu socia fragmento kiu konscias pri la danĝero de interkulturaj konfliktoj, kaj klopodas apliki solvojn unue ĉe ni mem.

Alfronti ĉiutage la saman fiaskon estas granda pruvo de kuraĝo.

Per tiaj pensoj mi gratulas vian klubon kaj dankas pro ĝia ekzisto, dezirante duoblan oran jubileon en 2074.

Giorgio Silfer laŭ *HeKo 845 6-A*, 9 sep 24
kaj Norda Legacio

Parolado en la festo de Esperanto-Klubo de Iisalmi

Osmo Buller estas longtempa aktivulo en la Esperanto-movado el Finnlando. Li estis ĝenerala direktoro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) dum multaj jaroj, ludante gravan rolon en la disvastigo kaj administrado de la Asocio. Lia gvida rolo en UEA helpis plifortigi la internacian komunumon de Esperanto-parolantoj kaj subteni diversajn projektojn por antaŭenigi la lingvon tutmonde. Buller estas respektata pro sia sindediĉo, organizaj kapabloj kaj profunda kono pri la Esperanto-movado.

Esperantistoj ofte diskutis kaj eĉ disputis pri tio, ĉu Esperanto havas filozofion aŭ ian mondkoncepton. Verŝajne plej multaj el ni samopinias, ke lingvo en si mem ne havas filozofion, sed ĝi estas nur rimedo por interkomunikiĝi kun aliaj homoj. Saman lingvon oni povas uzi por plej malsamaj celoj. Oni povas komuniki iun aferon de la ĉiutaga vivo aŭ esprimi kaj disvastigi filozofiajn, religiajn, politikajn aŭ kiajn ajn aliajn ideojn kaj opiniojn.

En la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marŝo en la jaro 1905 estis akceptita Deklaracio de Bulonjo, kiu difinis, ke "esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kia celo". Tiu difino signifas, ke la lingvo Esperanto mem ne havas iun filozofion, ĉar se ĝi havus, esperantisto povus esti nomata nur tiu, kiu uzas Esperanton por esprimi kaj disvastigi tiun filozofion.

Tra sia historio Esperanto vere estis uzata por plej diversaj celoj, ofte kontraŭdiraj kaj eĉ malamikaj inter si. Sufiĉas pensi pri fakaj Esperanto-asocioj, inter kiuj tra jardekoj troviĝis ekzemple plej diversaj religiaj kaj ateismaj asocioj.

Alia afero estas, ke Doktoro Zamenhof ja havis en sia penso ian filozofion, ideon, kiun li volis antaŭenigi per sia lingvo. Konata estas lia rakonto el sia infanaĝo, kiam li vivis en Bjalistoko, kie diversaj etnoj loĝis en malharmonio kaj malamikeco. La sentema knabo pensis, ke tion kaŭzis la fakto, ke la diversaj grupoj ne komprenis unu la alian, ĉar ili parolis malsamajn lingvojn. Sekve li decidis, ke kiam li plenkreskos, li kreos komunan lingvon por ili.

La unua UK en Bulonjo reprezentis en miniaturo la unuecan, harmonian homaron, kiun oni povus atingi pere de Esperanto. Unu el la plej famaj citaĵoj el Zamenhof estas la vortoj el lia kongresa parolado, laŭ kiu "en Bulonjo kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj".

El Bulonjo ni povas salti al la hodiaŭ tago, dolore sciante, ke ni ne venis pli proksimen al la ideala mondo, pri kiu Zamenhof revis. Bedaŭrinde eĉ pri esperantistoj kiel miniaturo de tia mondo ni ne povas paroli. Ekzemploj aperis jam en la tempo de Zamenhof, sed mi prenas ekzemplon el niaj tagoj. En februaro 2022 Rusio komencis plenskalan militon kontraŭ Ukrainio, kiun ĝi invadis ok jarojn pli frue. Tio vekis konsternon kaj protestojn ankaŭ inter esperantistoj, sed la protestoj ne estis unuanimaj. La prezidanto de Rusia Esperantista Unio eĉ fariĝis laŭparolilo de la militpropagando de sia lando.

Tre malfeliĉa epizodo okazis, kiam la ĉefdelegito de UEA por Rusio insultis la ĉefdelegiton por Latvio pro tio, ke ŝi skribis en Facebook kontraŭ la rusia invado. Tuj aperis postulo eksigi la rusan ĉefdelegiton pro neakceptebla konduto kontraŭ sia kolego. Oni tamen ne pretis fari tion kun la pravigo, ke la oficperiodo de ĉefdelegitoj jam preskaŭ finiĝis kaj sufiĉis ne reelekti tiun de Rusio por nova periodo. Tial eksigo ne havus praktikan signifon. Efektive estis tiel, sed la eksigo tamen havus grandan principan, moralan signifon, ĉar ĝi montrus, ke UEA postulas de siaj ofiĉantoj obeon de decaj kondutnormoj.

Oni pravigis tiun singardemon per tio, ke UEA estas politike neŭtrala kaj tial ĝi ne povas preni eksplicitan starpunkton pri la milito. Politikan neŭtralecon oni uzis kiel pravigon ankaŭ en aliaj kazoj, kiam inter la membroj de UEA regis kontraŭaj opinioj.

UEA vere ne bezonas preni starpunkton pri ĉiu konflikto, sed kiam iu konflikto vaste skuas la mensojn inter esperantistoj, UEA ne bezonas silenti, se Unuiĝintaj Nacioj faris decidon pri la afero. Pri la atako kontraŭ Ukrainio ekzistis decido de UN, ĉar ĝia Ĝenerala Asocio forte kondamnis la atakon. Same pri la nuna tragedio en Gazao necesas atenti rezoluciojn de UN, sed ankaŭ sendepende de ili UEA kaj Esperanto-organizaĵoj estas ĉiam liberaj iniciati agadojn por humanitara helpo aŭ kontribui al tiuj de Ruĝa Kruco kaj similaj organizaĵoj.

La milito en Ukrainio havis plorindajn sekvojn por ni esperantistoj sur tute persona nivelo. En retaj forumoj oni atakis kaj insultis unu la aliajn. Longtempaj amikecoj rompiĝis kaj turniĝis en malamikecon. Oni nuligis amikecojn en Facebook. Sankcioj kontraŭ Rusio ĉesigis reciprokajn vizitojn. Rusaj esperantistoj ne plu aperas en kongresoj kaj renkontiĝoj en la cetera Eŭropo kaj en aliaj t.n. okcidentaj landoj nek ni iras al aranĝoj en Rusio. Bedaŭrinde oni povis rimarki, ke en iu grado suferis ankaŭ rilatoj inter esperantistoj ekster Rusio, kiam ili havis malsaman opinion pri la milito kaj transiris al insultoj anstataŭ trankvile diskuti pri siaj diferencoj.

Tamen, ankaŭ la milito en Ukrainio iam finiĝos. Iam devos veni la tempo, kiam ni denove povos rilati kun esperantistoj en Rusio, inviti ilin al niaj renkontiĝoj kaj mem partopreni en iliaj aranĝoj. Jam nun ni devus pensi, ke iam ni renkontiĝos. Tial ni devus skribi kaj paroli tiel, ke estonte ni povu rigardi unu al alia en okulojn, sen ke ni bezonos memori kaj bedaŭri antaŭajn eldirojn, kiuj eble kaŭzos, ke ne plu eblos restarigi malnovan amikecon kun ĉiu.

Iam espereble ankaŭ rusoj kaj ukrainoj denove renkontiĝos kiel homoj kun homoj, eĉ se tio povos esti malfacila ankoraŭ longe post la militfino. Esperantistoj devus esti ekzemplo pri reamikiĝo, ĉar eĉ se esperantisto estas ĉiu, kiu uzas Esperanton, tute egale por kio, plej bonaj esperantistoj tamen estas tiuj, kiuj uzas ĝin kiel lingvon de amikeco trans ĉiuj limoj, kiuj dividas homojn.

Per tiuj ĉi Aŭtunaj Tagoj ni festas la 50-jariĝon de Esperanto-Klubo de Iisalmi, unu el multaj lokaj kluboj, kiuj funkciis kaj plu funkcias en Finnlando. Estas bela koincido, ke tiu ĉi jaro estas jubilea jaro ankaŭ de kluba Esperanto-agado en nia lando, ĉar en la jaro 1894, do antaŭ 130 jaroj, kelkaj studentoj en Helsinko fondis klubon, kies agado daŭris ĉirkaŭ du jarojn.

Nuntempe lokaj kluboj en nia lando, kaj ne nur en nia lando, estas malpli multaj kaj ilia agado malpli vigla ol antaŭe. Tio estas bedaŭrinda, sed ni esperu, ke kluboj tamen havas estontecon. Nenia teknika progreso povos plene anstataŭigi vivan kunestadon de homoj. De unikaj avantaĝoj de viva kunestado oni denove povis ekprofiti, kiam post la pandemia periodo oni revenis al ĉeestaj kunvenoj kaj aranĝoj. Ĉiuj ĝojis, ke tio denove eblis. Kun tiaj pensoj mi varme gratulas la esperantistojn de Iisalmi pro la jubileo de ilia klubo!

Osmo Buller



Osmo Buller, fotis: Tapani Juuti.

Koncerto de kanteloj

Timo Väänänen estas elstara kantelo-ludisto el Finnlando. Li estas konata pro sia majstreco pri la tradicia finna kantelo kaj ankaŭ pro sia kapablo kunfandi tradiciajn kaj modernajn muzikstilojn. Väänänen estas multflanka muzikisto, kiu ne nur ludas solojn, sed ankaŭ kunlaboras kun diversaj ensembloj kaj komponistoj por esplori novajn sonajn teritoriojn per la kantelo. Krom sia muzika kariero li laboras ankaŭ kiel edukisto, instruante la arton de kanteloludo al nova generacio de muzikistoj.

Koncerto de Timo Väänänen 2024-09-14 en Iisalmi

Parolado de Timo dum la koncerto inter la muzikprezentadoj

Vojaĝo

Bonan vesperon! Hodiaŭ mi ĝojas prezenti al vi koncerton kun kelkaj unikaj instrumentoj. Mi volus mallonge rakonti pri ili kaj la muziko, kiun vi aŭdis kaj aŭdos ĉi-vespere.

Antaŭ vi, vi vidas du kantelojn kaj unu kvinkordan ludilon el okcidenta Siberio.

La kantelo estas tradicia kordinstrumento el Finnlando kaj ĝiaj najbaraj regionoj ĉirkaŭ la Balta Maro. Ĝi havas diversajn nomojn en tiuj landoj: *kantele* aŭ *kannel* en la finna, *kannel* en la estona, *kokles* en la latva, kaj *kanklès* en la litova. Multaj aliaj popoloj ankaŭ konas kaj nomas ĝin laŭ siaj propraj lingvoj.

La tria instrumento, kiun vi vidas, estas fascinanta kvin-korda ludilo el Ĥanti-Mansio, regiono en okcidenta Siberio. En la ĥanta lingvo, ĝi nomiĝas *nars-juh*, dum en la mansa oni nomas ĝin *sangvylltap*. Kvankam ĝi similas al la tradicia kvin-korda kantelo, ĝi havas sian propran unikan sonon kaj historion. Interese, mia siberia instrumento estis fakte konstruita ĉi tie en Finnlando, surbaze de modeloj en la finnu-graj kolektoj de la Finna Nacia Muzeo.

Hodiaŭ mi prezentos al vi mian propran komponaĵon per ĉi tiu ludilo, inspiritan de la homoj, rakontoj, muziko kaj naturo de tiu siberia regiono, kiun mi havis la ŝancon viziti antaŭ kelkaj jaroj. La titolo de la komponaĵo estas *Iitje*. En la riĉa folkloro de okcidenta Siberio, *Iitje* aperas kiel grava heroo kaj aventuristo. Per la unika sono de la kvin-kordo de la ludilo, mi esperas inviti vin al muzika vojaĝo, kie ni eble renkontos *Iitjen*.

Sonĝo

Mia komponaĵo, kiun mi prezentos al vi nun, estas inspirita de melodio en kolektoj de karela tradicia muziko. Ĝin kolektis la etnomuzikologo *Armas Otto Väisänen* en 1919 en la vilaĝo *Videl* en Oloneca Karelio.

La melodion ludis al li 35-jara viro, *Tšertin Miikkula*, kiu nomis ĝin en la karela lingvo *Pläššimizeh soitanda* - dancludaĵo.



Foto: TV.

Ofte tia muziko estis – kaj daŭre estas – improvize komponata kaj ludata, kaj ĝi ofte havas introvertan etoson. Jen teksto de *Armas Otto Väisänen*, kiu priskribas la fenomenon en sia artikolo:

Eble multaj el ni spertis la trankvilan entuziasmon de popolkantistoj kaj popolmuzikistoj. Mi rimarkis tion ĉe multaj kantelo-ludantoj. La fingroj de la ludanto tuŝas la kordojn laŭ la melodio, sed liaj okuloj ne sekvas la agadon; ili estas direktitaj reve en la malprecizecon.

Dum unu el la maljunuloj de la vilaĝo Suojärvi ludis sian senfinan dancmuzikaĵon en krepuskiĝanta kabano, mi fotis kun sufiĉe longa tempo de impreso, kaj miris, ke li tute ne palpebrumis, nek alie atentis pri mia fotado. Li enprofundiĝis en la mondon de sia silenta muzikado.

Iom post iom, dum la sama melodio daŭris kun konstantaj variadoj, lia korpo komencis kliniĝi kontraŭ la tablo, la palpebroj fermiĝis, la viro ludis kvazaŭ en sonĝo. Kvankam mi aŭskultis per la scivolaj oreloj de sperta notprenanto, mi sentis min hipnotigita.

Citaĵo el A. O. Väisänen: *Laulu ja soitto kansanelämässä*, *Musiikkitieto* 11/1943, trad. TV.

Timo Väänänen

Itala Kongreso kaj seminario pri interkultura kompetento

Dum la 90-a itala kongreso de Esperanto (24.–31.8.) okazis seminario pri interkultura kompetento, kiun gvidis *Duncan Charters* kaj *Ilona Koutny*, ambaŭ bone konataj al esperantistoj. Bedaŭrinde pro la abunda cetera programo mi povis partopreni tiun seminarion nur parte.

La esprimo interkultura kompetento ŝajnas unuavice neklara. Pri kio temas, kiel diri tion finne? Temas pri kapablo multflanka, kiu inkluzivas i.a. lingvosciojn, komprenon kaj pozitivan sintenon al diverseco, spertojn pri malsamaj socioj, iliaj kutimoj kaj moroj. Duncan difinis interkulturan kompetenton (IKK) jene: la kuniĝo de kapabloj necesaj por kondukti efike kaj konvene kiam oni interagis kun personoj lingve kaj kulture malsamaj al ni. IKK estas tradukebla al la finna kiel *kansainvälisyystaidot* aŭ *kansainvälisyysosaaminen*.

Interkultura kompetento estas tre grava en nuntempa mondo. Homoj ofte ne konscias, ke por bone elturniĝi en fremdlingva medio ne sufiĉas lerni nur la lingvon, sed ankaŭ la kulturon de homoj parolantaj tiun lingvon. Ĉi-koncerne kulturo devas esti komprenata en sia vasta senco, ne nur kiel belartoj sed inkluzivante ĉiajn kutimojn de interhoma konduko, tradicioj, ag-, pens- kaj manĝmanieroj.

Duncan donis trafan ekzemplon. Li diris, ke lingvoinstruado en Usono ofte malsukcesas. Post kelkaj jaroj la lernantoj memoras preskaŭ nenion de tio, kio estis instruita. Tamen, se la instruisto inkluzivis erojn pri la kulturo de popoloj parolantaj la lernatan lingvon, tiuj informoj restis multe pli bone en la memoro de la lernantoj.

Ilona Koutny donis plurajn ekzemplojn, kiel interkultura komunikado povas malsukcesi, se oni ne estas konscia pri la diferencoj en pensado kaj kondutado. Ekz. reguloj de ĝentileco ne estas samaj en ĉiuj landoj. Grava parto de interkultura kompetento estas empatia kaj kunsentema sinteno, kapablo meti sin en la lokon de alia persono. Oni ne tuj kondamnu ĉion fremdan, sed demandu, kial la alia persono pensas aŭ agas tiel.

Ĉu Esperanto forigas ĉiujn problemojn? Certe ne, ĉar esperantistoj normale kondukas laŭ la kutimoj de sia hejmlanda kulturo. Duncan donis kiel ekzemplon siajn spertojn kun la estraro de UEA. Ĉiuj lingve kaj kulture kapablaj homoj. En renkontiĝoj evidentiĝis, ke ili havas malsamajn ideojn ekz. pri tio, kiel elpaŝi kaj ricevi parolvicon. Se oni ne atentigas tiujn diferencojn, ĉiuj voĉoj ne estos aŭdataj.

Esperantistoj parolas saman lingvon, lingvon kiun ili mem elektis, kaj estas malfermaj al aliaj kulturoj kaj iliaj reprezentantoj. Tamen oni ne forgesu, ke problemoj povas ekesti. Duncan parolis pri spertoj en la esperanta gastigad-sistemo Pasporta Servo. Ĉu kongruas la ideoj kiujn havas la gasto kaj la gastiganto pri la proponataj servoj? Ĉu ili interkonsentis pri tiuj? Kion oni faras, se ĉio ne iras kiel estis esperata?

Ilona parolis ankaŭ pri malsama kompreno de vortoj. Kvankam oni parolas saman lingvon, por multaj sudlandanoj profesoro estas instruisto en lernejo, dum en aliaj landoj (ekzemple Finnlando) profesoro estas instruisto kun la



Sirkka Mattlin veturanta per la funikularo de *Montecatini Terme*, regule funkcia ekde 1898.

plej alta grado en universitato. Tio estas ankaŭ la difino en PIV. Do, ne sufiĉas paroli la saman lingvon. Esperanto tamen estas bona bazo por pli bona interkomunikado kaj ilo por akiri spertojn en renkonto kun alilandanoj.

En la programo de la itala kongreso kompreneble estis multaj aliaj eroj. Estis pluraj kulturaj programeroj kiel ekzemple koncertoj de Jomo kaj Kajto, prezentoj de libroj, atelieroj, lingvokursoj kaj diversaj prelegoj. Estis ankaŭ pluraj ekskursoj al apudaj urboj en Toskanio. Oni ankaŭ ne forgesu konatiĝon kun la itala manĝkulturo, ĉar en la italaj kongresoj la partoprenantoj manĝas kune. Ĉiam estis klarigo pri la proponataj manĝaĵoj.

Sakari Kauppinen

UNU VIVO, UNU SERVADO

Saluton geamikoj en nia verda mondo!

Per kelkaj vortoj, mi rakontos al vi pri mia arto kaj miaj celoj en la lasta kvarono de mia vivo. Mi dividas mian vivon en periodojn de 25 jaroj. Mi nun havas 76 jarojn.

Periodo Unu

Ekkoni la vivon kaj ĝian diversecon. Vastigante komprenon. Mi ekkonas parapsikologion, teozofion, hipnoton, jagon kaj ĵudon. Intereso pri Zenismo vekigis. Mia patro mencias Esperanton.

Dua periodo

Neklara vagado kaj memserĉado.

Tria periodo


Judo nigra zono. Mi planas retiriĝon en la Zen-mondon. Arto venkas. Mi pasigis pli ol 20 jarojn konstruante grandan fabelon, kiu rakontas pri la fantazia mondo, kiun mi kreis, nomata *Karbujo*. Mi konstruis tie diversan kulturon kun centoj da bildoj. Vi povas koni Karbujon en [mia retejo](#).

Kvara periodo

Nuna etapo. (Aĝo 76) Mi koncentriĝas pri farado de arto. El miaj modestaj Esperanto-kapabloj, mi konstruas Esperanton en ilon por atingi mian celon.


Mi aldonas kelkajn bildojn, kiuj rakontas pri la fazoj de mia vivo. Mi rekomendas fari tian dividon mem por ĉiuj. Kelkfoje estas bone halti kaj pensi pri tio, kio estas eluzita kaj pri kio ankoraŭ laboros.

Plej amike
Markku Sarastamo



Maŝina linko, 2024

Markku Sarastamo estas popolaristo kaj fabelverkisto, kies verkoj estis ekspoziciitaj i.a. en 2007 dum la arta evento Festivalo Arta Lumo, organizita de la Esperanto-Asocio de Finnlando. La verkaro de Sarastamo inkluzivas la fabeltrilogion Karbujo, kiu parte aperis ankaŭ en Esperanto. El la unua parto de la trilogio estis presita esperantlingva brajla versio.



"NASU, MARKKU JA RUKKI"
SARASTAMO. FIN 2021



La Ratoj, 2004



Noa, 2021–23



Ĝangalo – kastelo, 2023

Kristo Savinto verde vestiĝos la 15-an de decembro

Tio estas tradukaĵo de la gazetara komuniko, kiu portugallingve atingos presorganojn. Ĝin sendis la brazila esperantisto James Resende Piton al la vacapa grupo (Whatsapp) de la ILEI-kongreso en Brazilo 2024. Li estis unu el la prelegantoj dum tiu kongreso. La subskribinto partoprenis la kongreson malĉeeste.

La monumento de Brazilo plej rekonata en aliaj landoj, la statuo de Kristo Savinto, estas unu el la mirindaĵoj de la moderna mondo. La urbo Rio-de-Ĵanejro, kies pejzaĝo garnas la monumenton, reprezentas ankaŭ la plej konatan brazilan bildon eks-terlande. La venontan 15-an de decembro, plia internacia elemento aldoniĝos al la bildo: tiam lumsistemo kovros la Kristo-monumenton per verdo pro la Tago de Esperanto. Tiu dato jam estas parto de la oficialaj kalendaroj de pluraj urboj kaj ŝtatoj en Brazilo, inkluzive de Rio mem. La verda koloro devenas el la flago, kiu reprezentas la movadon de tiuj, kiuj pledas por vasta apliko de la internacia lingvo Esperanto kiel dua lingvo. Neŭtrala lingvo, kiu faciligas la internaciajn interŝanĝojn kaj rilatojn inter civitanoj de malsamaj kulturoj, sen privilegioj por denaskaj parolantoj de tiu aŭ jena etnolingvo.

Sub aŭspicio de la ĉefepiskopo de Rio, lia kardinala moŝto *Orani Tempesta*, la evento kalkulas je entuziasma subteno de la respondeculo pri la sanktejo Kristo Savinto, pastro *Omar Raposo*. Pri lingvo, kiu estiĝis el la ideo kunfratigi popolojn, la memoro de la ĉefepiskopejo estas tute kongrua. La plej antikva faka asocio de Esperanto-parolantoj estas ĝuste internacia sekulara katolika organizaĵo, IKUE, fondita 1910. *Radio Vatikano* elsendas tri programojn en tiu lingvo ĉiusemajne kaj papo *Johano Paŭlo la Dua*, poligloto, aldonis Esperanton al pli ol 50 lingvoj en kiuj li disdonis en Kristnasko kaj Pasko, ekde la Baziliko Sankta Petro, la benojn *Urbi et Orbi* (t.e., universalajn).

La peton al la ĉefepiskopejo faris *Walter Fonter*, esperantisto en la urbo *Niteroi*, same en la ŝtato Rio-de-Ĵanejro. Walter senlace kaj volonte diskonigas tiun lingvon, ĉiumaniere kaj ofte en tre videblaj lokoj. Por konsciigi la homojn pri la ekzistado de la lingvo, la disvastigo de la nomo Esperanto sur dudekmetra rubando tirata de aviadilo, por miloj da homoj sur la marbordo de Rio, estis nur unu el la plej simplaj el ili. La lumpaneloj por trafikunordigo sur la Ponto Rio-Niteroi (13 km longa) iam anoncis la Tagon de Esperanto kaj tio okazis pro peto de Walter prezentita al la entrepreno, kiu administras la pontegon. Ankaŭ de li venis la ideo realigi foiron de E-libroj dum la semajno en la pramŝipa haveno de Niteroi, kun impresa rezulto.

La tago 15-a de decembro rilatas al la dato kiam naskiĝis en 1859, en Pollando, la iniciantinto de la lingvo, oftalmologo *Lazaro Zamenhof*. La lingvo publikiĝis en 1887 kaj de tiam produktiĝis granda nombro da verkoj, originalaj kaj tradukitaj. Estis baroj al la lingvo dum la Dua Mondmilito, sed troviĝas E-parolantoj en pli ol 120 landoj. La lingvo estas videbla ekzemple en la tradukilo de *Google*, en la paĝoj de *Facebook*, en Vikipedio kaj en la ĉefaj distribuajoj de la mastrumsistemo *Linux*.

*La novaĵon peris
Sylvia Hämäläinen
reprezentanto de ILEI en Finnlando*

Arkivo de pasintaj numeroj de Esperantolehti

En la retejo de EAF troviĝas jam kelkan tempon kolekto de *pasintaj numeroj de la gazeto*.

Ekde ĉ. la jaro 1997 temas pri la komputila versio de la papera gazeto, dum pli fruaj numeroj estas skanaĵoj (parte dankinde alireblaj tra *KUL* (Katolika Universitato en Lublino, Pollando) kaj *Finna*, la Nacia Biblioteko de Finnlando).



Tiu kolekto iom post iom kompletiĝos, kaj ampleksu ĉiujn haveblajn ekzemplerojn de la revuo, inkluzive de ties diversaj periodoj (*Esperanta Finnlando*, *Movado*, *Finna Esperantisto*), krome aldoniĝos la anstataŭaĵoj *Cirkulero* kaj *Informilo* - resume: ĉio, kio konsistigas la organon de EAF respektive Fondumo/Esperanto-Instituto de Finnlando/ Suomen Esperanto-opisto.

Celo de la laboro estas prilumi la historion de la Finna Esperantomovado kaj ĝiaj suborganizaĵoj, kaj disponigi la materialon en unu loko.

Se vi disponas pri mankantaj ekzempleroj (markitaj per demandosigno) - aŭ mem volus helpi en arkivado de pliaj (klubaj) gazetoj, kiuj aperis en Finnlando, inkluzive de FLEA, la Finlanda Laborista Esperanto-Asocio - mi ĝojus pri kontakto kun vi por aldoni tiujn al la kolekto.

Ideo aŭ sopiro estas, ankaŭ okupiĝi pri *Norda Prismo*, *Planteto* (ELFI), kaj aliaj.

*Laboremajn salutojn,
Robert Bogenschneider
brilanto@gmail.com*



Esperanto-flagoj super la strato apud la kongresejo.



Kongresanoj survoje al Kilimanĝaro.



La 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio

Renkonto kun la urba Afriko

La vojaĝo al la unua Universala Kongreso de Esperanto en Afriko, kiu okazis en Aruŝo, Tanzanio estis mia dua al Tanzanio. Tamen tiu vojaĝo donis tute alian rigardon al Afriko ol turisma vojaĝo al naturparkoj, kiun mi faris antaŭ 18 jaroj.

La kongresejo, Aruŝa internacia konferenca centro, estis tute taŭga, eĉ pli bona ol multaj aliaj kongresejoj. Iom nekutima tamen estis, ke la gardistoj kontrolis la sakojn ĉiam kiam kongresanoj eniris. Granda parto el libera diskutado kaj renkontado inter amikoj okazis ankaŭ ekstere, kaj la temperaturo ne estis aparte varmega, por kompari kun la finnlanda somera vetero, eĉ iom malvarmeta. Ofte la plej alta temperaturo ne superis 18 gradojn. La loko estas sufiĉe alta, 1 400 metroj super marnivelo, kio klarigas la temperaturon.

La malriĉeco videblis en la ĉirkaŭaĵo. Stratoj eĉ en urbo ne ĉiam estis pavimitaj, ofte mankis stratlumoj kaj post la sunleviĝo regis ĝenerale mallumo. Eĉ en restoracio en kiu mi vizitis kaj manĝis ekstere, ne estis lumo ĉe la tablo kaj necesis uzi sian propran lumigilon (el la telefono) por vidi la menuon. Dum la dekminuta piediro al la kongresejo kutime renkonteblis kelkaj vendistoj de T-ĉemizoj, pentraĵoj kaj aliaj etaj aferoj. Foje ili estis tre persistemaj kaj ne akceptis facile la nean respondon. Tamen ĝenerale la urbo donis sufiĉe sekuran impreson, almenaŭ dum la luma tempo (kaj ĉe la ekvatoro la malluma tempo estas ĉiam same longa kiel la luma). Mi aŭdis pri nur unu provo rabi kongresanojn kaj alia kongresano koliziis kun motorciklo. La trafiko en la urbo tamen estis sufiĉe kaosa, kiel kutimas esti en triamondaj urboj.

Ankaŭ sur la interurbaj vojoj la trafiko estis sufiĉe sovaĝa. Ekzistis multe da ŝarĝaŭtoj, turismaj aŭtobusoj kaj aŭtoj de lokanoj kaj la rapideco ne bone kongruis kun la kvalito de la vojoj.

Oni ĝenerale timis antaŭ la kongreso ke venos malmulte da afrikanoj, sed feliĉe UEA subvenciis multajn afrikanojn el Tanzanio kaj el najbaraj landoj kaj donis al ili eblecon partopreni la Universalan Kongreson. Granda parto el la afrikanoj parolis Esperanton tute bone kaj interesiĝis pri ĝi. Al unu juna viro mi donacis libron pri pedagogio de Esperanto kiam mi aŭdis lin en la libroservo laŭdi la libron sed samtempe plendante ke mankas mono por aĉeti ĝin. Afrikanoj ankaŭ partoprenis en kongresaj programeroj aktive kaj en la interna-

◀ Solena fermo. LKK-anoj kaj helpantoj sur la podio. Fotoj: JP.

cia arta vespero, kies programon kongresanoj mem faras, granda parto, eventuale plimulto estis programeroj fare de afrikanoj. La svahila havas en Tanzanio tre fortan pozicion, kaj preskaŭ ĉiuj lokanoj kiuj parolis en la inaŭguro kaj fermo uzis la svahilan kaj ne la anglan.

La aranĝoj funkciis grandparte bone, eĉ komputilajn problemojn la kongresejaj laborantoj solvis rapide. Tamen almenaŭ unu programero multe malfruis kaj foje la manĝilaro en la kongresa por-okaza manĝejo estis malpuretaj. Multaj eŭropaj kongresanoj ekskursis multe, sed mi partoprenis nur la ekskurson dum la ekskurso tago kaj iris al Kilimanĝaro kie la Esperanta grupo grimpis al alteco de 2700 metroj.

En la kongresa programo elstaris du filmoj en kiuj ĉefrolis finnlandanoj: "La somero de Sigrid" kaj "Verda Saliko", kiuj

estis filmitaj de la ruslandano *Aleksej Salomatov* tiam, kiam vojaĝado inter niaj landoj ankoraŭ estis facila. Mi mem sukcesis vidi nur la unuan filmon, ĉar mi devis partopreni komitatkunsidon kiam la dua estis en la programo.

Do, la kongreso estis relative kutima, ĉar estis pli-malpli la samaj programeroj kiel en aliaj lastatempaj UK-oj, sed apartan guston donis la afrikaj kongresanoj, kiuj estis ankaŭ tre junaj. Mi verŝajne apartenis al la pli maljuna kongresanaro, eventuale la unuan fojon en ĉiuj pli ol 20 kongresoj al kiuj mi partoprenis. Krome la kongreso donis eblecon konatiĝi kun ordinaraj afrikanoj, kio kutime ne eblas dum turisma vojaĝo al naturparkoj.

Jukka Pietiläinen

UEA premiis pri elstaraj kaj elstaraj artaj agadoj

En la Solena Fermo de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Aruŝo estis anoncita la disdono de 8 diplomoj pri Elstara Agado kaj 4 pri Elstara Arta Agado por la jaro 2024. La *Diplomoj pri Elstara kaj Elstara Arta Agadoj* estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.

Elstara Agado

Aime Patrick Manirakiza (Burundo) pro elstara agado kiel kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, interalie pro efika subteno al la preparado de la UK 2024.

Alessandra Madella (Ĉinio/Italio) pro lastatempe abunda eldona agado kaj fervora instruado de Esperanto en Ĉinio.

Etsuo Miyoshi (Japanio) pro la malavara laboro pri disvastigo de Esperanto en Eŭropa Unio inter alie ĉe amaskomunikiloj, kaj pro aktiva kontribuo por financa subteno de UEA kaj ĝia grava tutmonda agado por informado.

Heinz-Wilhelm Sprick (Germanio) pro elstara kluba agado en *Hameln* kiel organizanto de kunvenoj ĉeestaj kaj retaj, kant-konkursoj, retaj kursoj.

Jehoŝua Tilleman (Israelo) pro jardekoj da daŭra agado kiel UEA-ĉefdelegito kaj varbado de individuaj membroj en Israelo.

Laure Patas d'Illiers kaj *Pierre Dieumegard* (Francio) pro la elstara agado kadre de la movado *Eŭropo-Demokratio-Esperanto* (EDE), kiu kandidatiĝas por la balotado de la Eŭropa Parlamento ĉiun kvinan jaron kaj tiel videbligas Esperanton al la franca loĝantaro.

Orlando Raola (Usono/Kubo) pro laboro en la Estraro de UEA aparte kiel unu el la ĉeforganizantoj de la 1-a kaj 2-a Virtualaj Kongresoj de Esperanto dum la pandemia epo-

ko, pro kerna kontribuo al kontraktaj aranĝoj por nova hejmo de *Biblioteko Hector Hodler* (BHH) kaj nia arĥivo kaj pro la aktivado en Esperantujo kiel akademiano, longtempa estrarano kaj prezidanto de Esperanto-USA.

Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro AERĴ (Brazilo) pro longtempa aktivado en la urbo kaj subŝtato Rio-de-Ĵanejro: ĉiujara okazigo de la Esperantaj Subŝtataj Renkontiĝoj kaj Trejnado de Esperanto-Instruistoj, monataj migrantaj kulturaj renkontiĝoj, bontenado de la *Biblioteko Carlo Bourlet*, eldono de la revuo *Rio Esperantista* kaj informado pri Esperanto, inkluzive ĉe la Libro-Bienalo de Rio-de-Ĵanejro, la plej granda literatura foiro en Latin-Ameriko, en kiu ĝi reklamas Esperanton al pli ol 600 mil homoj ĉiun duan jaron.

Elstara Arta Agado

Emmanuelle Richard (Francio) pro la elstara kontribuo al la literaturo tradukita en Esperanton, inter alie per eldonado de la gravaj verkoj *Reĝo Ubuo* kaj la *Mil kaj unu noktoj*, kiuj aperis kadre de la serio *Oriento-Okcidento*.

Julian Modest (*Georgi Mihalkov*) (Bulgario) pro la elstara kaj ampleksa kontribuo al la originala literaturo en Esperanto, per verkado de multaj verkoj, ĉu romanoj, novelaroj, esearoj, krimromanoj ktp.

Tim Owen (Britio) pro la sukcesa eldona agado nome de Esperanto-Asocio de Britio (EAB).

Zhou-Mack Mafuila (D.R. Kongo/Francio) pro la elstara kontribuo al la E-muziko laŭ la stiloj afroĵazo, afrohinda funko kaj reĝeo.

laŭ GK 1186

IJK en Ŝventoji, Litovio

La 80-a Internacia Junulara Kongreso okazis en Litovio en la fino de aŭgusto. Estis la unua IJK en tiu lando. La loko nomiĝis *Ŝventoji*, kiu estas urbeto ĉe la bordo de Balta Maro. La regiono estas bela kun ĝiaj longaj sablaj plaĝoj, sed iom malfacile atingi, postulante multajn ŝanĝojn de buso.

Mi antaŭe partoprenis unu IJK-n, tiun en Italio lastjare, kaj mi ne povas eviti kompari la du spertojn. Ĝenerale, mi trovis ĉi-jaran kongreson iom malaltkvalita kompare al la lasta. Povas tamen esti, ke lastjare ĉio simple aspektis pli interese kaj bone pro ĝia noveco.

Unue iomete pri la loko. Ŝventoji havis aspekton de vera turistkaptivo. La kongresejo estis feliĉe iomete aparta de la centro kaj libera de turistamasoj, sed kelkfoje nokte la muzikumado en la urbocentro estis tiom laŭtega, ke eĉ ni duonkilometron for suferis pro ĝi.

Ŝventoji situas nur kelkajn kilometrojn for de la Latvia landlimo kaj oni povas facile iri tien sekvante la plaĝon. En la lasta tago de la kongreso mi promenis tien kun kelkaj samideanoj. Unu el ni portis esperantan flagon. Estis amuze, kiam multaj preterpasantoj venis por demandi "kiu flago estas tiu" kaj "ĉu vi estas brazilanoj".

La kongresejo estis sufiĉe simpla kaj malluksa. Por loĝado estis dometoj, kiuj ne havis varmigadon aŭ akvon. Lavi vestaĵojn oni ne povis. La necesejojn mi ne eĉ menciu. Tamen la prezo de la kongreso estis ankaŭ tiel malalta, ke oni ja povis atendi simplajn kondiĉojn.

Pli malfeliĉe estas, ke la programo ankaŭ estis iom simpla. Tage estis fojfoje manko de interesaj programeroj. Aliflanke multaj programeroj okazis tre malfrue. Tia aranĝo ŝajnas iom strange al mi. Kial ne havi la programon dum la tago, kiam homoj ne dormas?

En iuj manieroj la organizo estis tamen pli bona ol lastjare. En la alventago la akceptejoj funkciis efike kaj rapide. La kongresejo estis ankaŭ sufiĉe kompakta. La manĝoj ne estis inkluzivaj, do eblis ŝpari monon per kuiri mem.

La plej bona parto de kongreso estas kompreneble la homoj, kiujn oni renkontas. Mi vidis denove kelkajn esperantistojn, kiujn mi jam konis, sed eĉ pli da novaj konatuloj.



Flago ĉe la plaĝo apud la kongresejo. Foto VV.

Entute la kongreson partoprenis ĉirkaŭ 200 homoj el pli ol 30 landoj.

Por konkludi, la kongreso estis malluksa sed ĉiuokaze ĝuebla sperto. Malgraŭ la mankoj ĝi sukcesis en sia ĉefa celo: ebligi samideanojn renkontiĝi kaj uzi Esperanton en internacia etoso.

Vilho Virtanen



Flago ĉe la landlimo inter Latvio kaj Litovio. Foto VV.



Tatu, Raimo kaj Vilho. Foto KH.

Internaciaj lingvoj en komparo

Risto Kupsala diplomiĝis kiel magistro de komputilscienco (2008) kaj magistro de lingvistiko (2023) de la Universitato de Oulu. Li estas la kreinto de la planlingvo Pandunia, kiu estas desegnita por esti simpla kaj ekvilibra lingvo, inspiritaj de diversaj naturaj lingvoj de la mondo. Li celas krei lingvon, kiu faciligas komunikadon inter homoj de diversaj lingvaj kaj kulturaj fonoj, kun la intenco redukti lingvajn barojn kaj pliigi interkompreniĝon tra la mondo. Lia alia lingva projekto estas la finnugra planlingvo Samboka.



Pandunia estas internacia helplingvo same kiel Esperanto. Kio distingas ilin? Kaj kial oni faru novan helplingvon post Esperanto?

Kiam parolantoj de Esperanto pensas pri helpantaj lingvoj, ili kutime pensas pri planlingvoj, sed fakte la plej komunaj helpantaj lingvoj estas naturaj, etnaj kaj naciaj lingvoj. La plej parolata lingvafrankao hodiaŭ estas la angla. Ĝi ne estas nur nacia lingvo parolata ĉefe en unu lando sed ĝi estas multenacia lingvo. La angla estas la ĉefa lingvo en pluraj landoj kaj oficiala lingvo en multaj aliaj landoj. Ĝi estas ankaŭ labora lingvo en multaj internaciaj organizacioj kaj firmaoj.

Ĝi estas la plej vaste uzata internacia lingvo hodiaŭ.

Do oni ne devus kompari novajn planlingvojn nur kontraŭ Esperanto. Ĝi ja estas nekompareble granda planlingvo, sed tamen ĝia internacia uzo estas malvasta en komparo kun la uzo de la angla. *Jouko Lindstedt* skribis: "Se Esperanto estus uzata kaj instruata egale vaste kaj senrivale kiel la angla nune, ni certe rigardus tion kiel venkon de nia lingvo, verŝajne eĉ kiel la finan venkon." Tial en ĉi tiu artikolo mi komparas Pandunian kontraŭ ambaŭ jam menciitaj internaciaj lingvoj, Esperanto kaj la angla.

La ĉefaj punktoj de komparo inter internaciaj lingvoj estas ilia neŭtraleco, rekonateco, lernebleco, uzebleco kaj esprimovo. Mi povas kompari ilin teorie, kvankam la vera provo estus en uzo. Bedaŭrinde mi ne povas diri multe pri uzo de Pandunia, ĉar ĝi estas ĝis nun provita kaj uzita de nur malgranda – tamen internacia – grupo de uzantoj.

Neŭtraleco

La angla ne estas neŭtrala internacia lingvo, ĉar ĝi apartenas al siaj denaskaj parolantoj. Denaskaj parolantoj ĉiam komandas la anglan pli bone ol fremduloj. Ĝi povas esti neŭtrala komunikilo nur kiam ĝi estas parolata inter homoj, kiuj ne parolas ĝin de nasko. Tamen nuntempe tiaj situacioj okazas pli kaj pli ofte, kaj do homoj devus pensi, ke la angla finfine estas neŭtrala lingvo. Tio ne taŭgas. Ĉiukaze ĉies angla nivelo estas komparata kontraŭ la nivelo de denaskaj parolantoj, kiuj ĉiam starigas la kriteriojn de bona lingvo.

Se denaskaj parolantoj ne aprobas iun parolmanieron, tio ne estas bona angla. Do la angla neniam povas esti vere neŭtrala internacia lingvo.

Ĉu Esperanto estas neŭtrala? Ĝi ja ne estas lingvo de iu nacio aŭ etno. Kvankam ekzistas denaskaj parolantoj, ĉiuj de ili estas dulingvaj. Do Esperanto estas neŭtrala en tiu senco, ke ĝi estas samtempe (preskaŭ) nenies kaj (kapable) ĉies lingvo. Tamen ekzistas ankaŭ aliaj kriterioj de neŭtraleco.

Grava kriterio por monda lingvo kiel Esperanto estas kompreneble monda neŭtraleco. Esperanto ne estas neŭtrala en la tuta mondo. Ĝi estas eŭropa laŭ sia vortprovizo kaj hindeŭropa laŭ sia konstruo. Neniu dirus ion, se Zamenhof anoncus en la Unua Libro, ke Esperanto estu interlingvo nur por Eŭropo. Tio estus perfekte harmonia kun la konstruo kaj la vortprovizo de la lingvo. Zamenhof mem skribis en la antaŭparolo de la Unua Libro, ke li pruntis vortojn, kiuj estas "komunaj por ĉiuj civilizitaj popoloj". Kiuj estis tiuj "civilizitaj popoloj"? Ĉinoj de Pekino? Araboj de Kairo? Ne! Ĉiuj scias, ke Zamenhof celis nur okcidentulojn.

Pandunia estas neŭtrala en ambaŭ sencoj. Ĝi estas samtempe nenies kaj ĉies lingvo, kaj ĝi estas inkluziva de vortoj de la tuta mondo. Pandunia pruntas vortojn de ĉiu kontinento kaj de ĉiu granda kulturo.

Profesoro *Hartmut Traummüller* en sia prelego *La plej disvastiĝintaj vortoj* diris, ke historie la disvastiĝo de internaciaj vortoj estas limigita ene de la sama kulturkomunumo kaj ekzistas kvar superregaj kulturoj kun pli ol miljara historio: la okcidenta, la afrikazia (t.e. mezorienta), la sudazia (t.e. hindia) kaj la orientazia (t.e. ĉina). Traummüller rimarkigas, ke ĉiu el tiuj nun ampleksas pli ol 1,6 miliardon da homoj kaj posedas grandan propran stokon da internaciaj vortoj.

Mi kolektis procentaĵojn de pruntvortoj en kelkaj lingvoj, kiuj apartenas al diversaj kulturkomunumoj, al la aldonita tabelo. Mi inkluzivigis ankaŭ Esperanton kaj Pandunian en la tabelon por montri, ke ili havas tute malsaman strategion por prunti internaciajn vortojn. Esperanto prenas vortojn ĉefe de la okcidenta stoko. Pandunia prenas pli egale de ĉiuj internaciaj stokoj.

Lingvo	Originaj vortoj (%)	Pruntvortoj (%)				
		okcidentaj	mezoriantaj	hindiaj	ĉinaj	aliaj
Esperanto	2	95	1	< 1	< 1	2
Angla	30	60	< 1	< 1	< 1	4
Hispana	70	15	10	< 1	< 1	5
Rusa	80	18	2	< 1	< 1	< 1
Persa	58	2	40	< 1	< 1	< 1
Hindia	28	5	25	41	< 1	1
Sŭahila	54	10	35	1	< 1	< 1
Indonezia	55	26	8	4	2	5
Japana	35	5	< 1	< 1	60	< 1
Mandarena	78	< 1	< 1	< 1	20	< 1
Pandunia	0	40	25	10	20	5

Rekonateco

Rekonateco signifas, je kioma grado diversaj homoj povas rekonati vortojn kaj esprimojn en internaciaj lingvoj. Unulingvaj homoj kompreneble rekonas nur esprimojn de sia denaska lingvo kaj de lingvoj, kiuj estas iom similaj al sia denaska lingvo. Parolantoj de pluraj lingvoj povas rekonati similaĵojn al ĉiuj lingvoj kiujn ili scias.

La angla apartenas al la ĝermana lingvaro. Ĝenerale la angla ne estas komprenebla sen studo al parolantoj de aliaj ĝermanaj lingvoj, kvankam kelkaj anglaj vortoj kaj frazoj povas esti rekoneblaj. Tamen la angla profitas de ĝermana kaj latinida vortaro, kiu estas parte komuna kun preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj. Aldone la angla profitas de sia pozicio kiel la ĉefa internacia lingvo. Multaj homoj renkontas anglajn esprimojn neintence pro la internacieco de la lingvo.

Esperanto estas konstruita lingvo, do ĝi ne havas lingvajn familianojn krom etaj esperantidoj. La konstruo de Esperanto estas tia, ke Esperantaj frazoj ne estas kompreneblaj sen studo de ĝia gramatika sistemo, kiu tamen estas simpla. Same kiel la angla, Esperanto profitas iom de rekonateco de okcidentaj internaciaj vortoj.

Ankaŭ Pandunia estas konstruita lingvo sen lingvaj familianoj, sed ĝiaj plej oftaj vortoj kaj ĝia vortordo similas al tiuj de la angla kaj ofte ankaŭ al aliaj ĝermanaj lingvoj. Oni povas reciti la sekvantan "universalan ĝermanan versaĵon" (adaptita de originalo de *King Ming Lam*) en Pandunian kaj ĝi estus plejparte komprenebla al parolantoj de ĉiuj ĝermanaj lingvoj.

Lingvo	Ekzemplo
Pandunie	<i>Kom in mi se haus, mi se frende. Gud kom! Kom hir, chante en danse, yam en gul. Da es mi se plan. Vi hab sui, bir, milke en garme sup!</i>
Angle	<i>Come in my house, my friend. Welcome! Come here, sing and dance, eat and drink. That is my plan. We have water, beer, milk and warm soup!</i>
Germane	<i>Komm in mein Haus, mein Freund. Willkommen! Komm her, sing und tanz, iss und trink. Das ist mein Plan. Wir haben Wasser, Bier, Milch und warme Suppe!</i>
Svede	<i>Kom in i mitt hus, min vän. Välkommen! Kom hit, sjung och dansa, ät och drick. Det är min plan. Vi har vatten, öl, mjölk och varm soppa!</i>

Jen la sama Esperante: Venu en mian domon, mia amiko. Bonvenon! Venu ĉi tien, kantu kaj dancu, manĝu kaj trinku. Tio estas mia plano. Ni havas akvon, bieron, lakton kaj varman supon. La Esperanta teksto estas plejparte miksaĵo de latinidaj kaj ĝermanaj vortoj, sed unulingvaj parolantoj de ambaŭ lingvaro ne povus kompreni la tutan tekston – apenaŭ duonon!

Pandunia pruntas nur la plej oftajn vortojn de la angla kaj aliaj ĝermanaj lingvoj. Resto de ĝia vortaro estas multekultura. Tio estas strategia elekto por konkeri la mondon. La angla estas la plej ofte lernita lingvo en la mondo hodiaŭ, sed multaj homoj lernas ĝin neperfekte. Pandunia agnoskas ke iu tipo de internacia lingvo jam ekzistas. Tial ĝi celas milionojn kaj milionojn da parolantoj kaj lernantojn de la nuna internacia lingvo. Samtempe ĝi agnoskas ke la mondo bezonas komunan lingvon, kiu estus pli facila, pli efika kaj pli multekultura ol la angla. Pandunia celas esti la sekvanta nivelo post la internacia angla.

Lernebleco

El la tri komparataj lingvoj, la angla estas klare la plej malfacila. Ĝi havas multe da neregulaĵoj kaj komplikajoj: nefone-man skribsistemon, neregulan akcenton, preskaŭ 200 neregulajn verbojn ktp. Oni devas elspezi multajn jarojn por lerni la anglan. Eĉ homoj, kiuj finfine sukcesas lerni ĝin, faras erarojn kaj parolas ĝin en sia propra, rimarkeble fremda kaj nestandarda maniero. Ne temas nur pri akĉento sed ankaŭ pri gramatikaĵoj, vortelektoj kaj esprimmanieroj.

Esperanto estas regula lingvo. Ĝi havas koncizan gramatikon, sed ĝia radikaro ne estas konciza. Tiu superflueco donis kialon por bonlingvismo, la ideo ke oni uzu kunmetaĵojn anstataŭ unuradikaj internaciaj vortoj. Estas normale por ĉiuj lingvoj, ke originalismo kaj internaciismo konkuras, sed malfeliĉe ĝi konfuzas lernantojn, kiuj devus elekti inter "puraj" kunmetaĵoj kaj "komunaj" internaciaĵoj.

La baza gramatiko de Esperanto estas simpla lime al naiveco. Subtenantoj de Esperanto kelkfoje diras, ke finaĵoj, kiuj markas gramatikan kategorion de vorto, estas la "sekreto" kial Esperanto estas pli facila ol aliaj lingvoj. Mi opinias, ke manko de malsimplaj kaj variaj sufiksoj faras la Esperantan gramatikon relative simpla en komparo kun eŭropaj lingvoj – sed ne plu! Estas sufiĉe simple rekoni frazelementojn ankaŭ en tiuj lingvoj, kiuj ne uzas finaĵojn, dank'al vortordo kaj aliaj signoj. Oni povas montri, ke eĉ Esperanto ne bezonas siajn finaĵojn. Frazoj estas tute kompreneblaj sen ili. Ekzemple "mi manĝ la sup de la metal teler" estas tiel klara kiel "mi manĝ-as la sup-o-n de la metal-a teler-o", ĉar la normala vortordo kaj la artikolo jam montras la gramatikan konstruon sen aldona helpo de la finaĵoj. (Oni povas uzi la finaĵojn por varii la vortordon en Esperanto, sed tio estas alia afero.)

La gramatiko de Pandunia estas modeligita laŭ ekzemplo de piĝinoj, kiuj estas naturaj interlingvoj. Ili kutime estiĝis dum la koloniisma epoko en plantejoj, minoj kaj fervoj-konstruejoj, kie diversetnaj laboristoj ne havis komunan

lingvon. Ankaŭ nuntempe oni povas trovi similajn lingvojn en internaciaj kontaktoj, kie plenkreskuloj parolas iun simpligitan lingvon, kiel "hoono soomi" aŭ "broken English". Kutime piĝinoj havas tre simplan gramatikon sen fleksioj kaj ili esprimas gramatikajn konstruojn per helpo de memstaraj vortoj. La gramatiko de Pandunia funkcias principe en tiu maniero.

Uzebleco

La internacia lingvo devas esti facile uzebla. Oni povus diri, ke la angla estas tro kompleksa lingvo por internacia uzo. Ĝi havas tiom multe da fonemoj, homonimojn kaj sinonimojn, regulojn kaj esceptojn ke diverslingvaj homoj ne povas uzi ĝin en la sama maniero. Rezultas diversaj parolmanieroj kaj akĉentoj, kiuj tro malfaciligas komunikadon en la internacia angla.

Esperanto estas pli facile uzebla ol la angla, kaj akĉentoj de Esperanto ne estas tro diversaj. Tamen ankaŭ Esperanto metas malhelpaĵojn en la vojon de siaj uzantoj. Multaj Esperantaj vortoj estas malfacile prononceblaj pro fremdaj fonemoj kaj longaj serioj de konsonantoj. Tajpado de Esperanto malfacilas pro la malbonfamaj ĉapelitaj literoj.

Pandunia ne celas esti la plej simpla lingvo en la mondo. Sufiĉas, ke Pandunia estas pli facila ol siaj ĉefaj konkurantoj. Do Pandunia estas pli simpla, pli regula kaj pli konciza ol la angla, kaj ĝi ne havas malfacile prononceblajn vortojn kaj malfacile tajpeblajn literojn alie ol Esperanto. Pandunia havas kelkajn pezajn konsonantseriojn kaj finajn konsonantojn, sed oni povas prononci ilin all'italiana t.e. kun helpanta senakcenta vokalo, ekz. la vorto gud ('bona') povas esti prononcita /gud/ aŭ /gudə/.

Esprimovo

Iam homoj dubas, ĉu oni povas esprimi ĉion en planlingvoj. Esperantistoj scias ke la ĝusta respondo estas jes. Aldone oni povas esprimi sin pli bone kaj pli libere en komplete lernita planlingvo ol en nekomplete lernita natura lingvo. Parolanto de "broken English" ne profitas de la tuta riĉeco de la denaska angla, kaj tiel same eterna komencanto ne profitas de la nekomparebla esprimovo de Esperanto.

Pandunia estas nova lingvo kaj kompreneble ĝia esprimo estas ankoraŭ malriĉa. Mi nur povas esti esperanta kaj diri, ke ĉion, kion oni povas esprimi en Esperanto hodiaŭ, oni povas esprimi en Pandunia morgaŭ.

Risto Kupsala

Specimenoj el la sudokcidentfinna dialekta literaturo

Tuomo Grundsrom

Frans Hjalmar Nortamo (1860–1931) estas la fondinto de la finnlingva dialekta literaturo. Li dufoje elektis por sia verkado: unue sian gepatran finnan lingvon anstataŭ la lerneja sveda, kaj due la dialekton de sia hejmurbo *Rauma* (elp. raŭma) anstataŭ la tiam jam stabiliĝinta norma finna. En lia verkaro elstaras du longaj noveloj, fakte romanetoj: *La lasta veturo de la ŝipo "Espero"* ("*Rojohoppe*" viimene reis) kaj *Nia vizito al banko en Turku* (*Tasala Vilikum berindraha*) humure priskribanta epizodojn okazantajn al tri urbetanoj en la iama ĉefurbo. En la traduko mi ne klopodas imiti dialektaĵojn – ties "esperantigo" fakte neindas, neblas, rezultigus nur kompatindajn fuŝojn – sed redoni laŭeble la stilon kaj spiriton de la originalo. En la unuemenciita novelo troviĝas la kanto konata kiel *Marista preĝo* (*Meripoikkatte veis*), kiun la rakontanto, unu el la protagonistaj triopo, kreas dum sia reveno de Turku. La du kamaradoj kritikis kelkajn punktojn, kiel strofon kvinan ("tia lukso surmare, vi fantazias") kaj sepan ("tiaĵon ne raportu!"), sed fine aprobas kaj kunkantas. La kanto daŭre ege popularas. La rakonto estas longa, ampleksas 70 prespaĝojn. Jen nur unu epizodo pri la ekesto de la kanto kaj koniganta al vi la bravan protagonistan triopon Vilhelmo, Izako kaj Karlo (la rakontanto) en la novelaro de Nortamo.



Foto, TG.

...dum la hejmenveturo mi ekpensis, ke nun venis la momento elkanti mian verkaĵon de Turku. Mi proponis kunkantadon, diris: "Sciu, knaboj, mi faris novan kanton."

"Nu do tiel", diri Vilĉjo.

"Novan kanton, do", diris Izako.

Por veron diri, mi ofendiĝis. Unu rompas al si la kapon dum tuta antaŭtagmezo por kompili kanton – tute ne bagatela laboro – kaj atendas de aliaj intereson aŭdi, kia estas preta laboro. – Sed egale, mi pensis, ĉar vi ne volas aŭdi, ne aŭskultu, kaj mi ekzumis mian novan kanton. Pluveturinte unu, du verstojn, Vilĉjo kridemandas: "Kial, damne, vi nun ne kantas vian novaĵon?"

"Neniu min petis kanti."

"Ĉu iu vin malpermesis?"

"Ne rifuzite nek petite, tial mi kantas ĝin al mi mem."

"Al vi mem, sed mi trovas ke prefere plensilenti ol zumsusuri kiel insekto. – Kalĉjo, gaje ellasu vian voĉon."

"Kiel bele vi petas", mi preskaŭ diris, tamen retenis min kaj decidis kanti, kvankam plu sentis ofendiĝon. Verdire mi estis

ofendita. Sed mi evidente estas tipa kantoformigisto, kiu ne povas teni sekreta sian verkaĵon, ne, tiu devas esti aŭdita. Tiel ja. Kaj tiel okazis, ke mi klarigis la gorgon kaj diris: "Estas unu 'Marista kanto'" – kaj komencis:

*Gardu, ŝirmu l' maristojn, ho Dio!
Laboregas ni por la panpec'
sur tabuloj, lontanaj de ĉio
oceane, kaj sen liberec'*

Mi ripetis la refrenon "Laboregas ni por la panpec' ktp." kaj supozis, ke ili kunkantus. Sed sonis nenio. Nu, egale, mi kantis la duan strofon:

*Blovas vento kaj l' mar' furiozas;
nun necesas de ĉiu plenfort'.
Se ni nur por momento ripozas,
prenos la ŝipanaron dronmort'.*

Mi refrenis la lastajn du versojn, sed ankaŭ nun ili ne kunkantis, do mi diris: "La kanto ŝajne ne gajnas vian vian aprobon. Mi ne ŝatas solkantadon, do mi finas."

"Nu silentu pri tiaĵo", diris Vilĉjo, "ne kredu ke ni lernus la melodion en momento. Estas bela melodio en via kanto. Kiekiel vi ĝin trovis-faris?"

”Pripensu tion”, mi respondis, kaj mi estis ree ĉagrenita, ĉar li nenion diris pri la kanto, nur pri la melodio. Sed mi sufokis mian maljunan Adamon kaj ekkantis:

*En meztag' kaj en malluma tardo
akvotrepaj, en frost', kun malsat';
eĉ la kuiristo sur jardo,
veloj urgas pli ol lia pat'.*

Nun ili ja kunkantis la refrenon, sed poste ili ekkritikis min, kaj Vilĉjo diris: ”En kia damnejo vi navigis, ĉar vidis kuiriston sur jardo. Tia aserto estas nura kaj pura mensogo. Pro diablo, se en ŝipoj kie mi navigas, grimpus kuiristo sur jardon kiam mi ferlas, mi dirus: ’Al diablo, kuirknabo!’ Tiel dirus mi kaj ĉiu sperta maristo. – Kuiristo sur jardo! Ja ĉiu scias, ke kuiristo dankas Dion, se oni permesas al li streĉi lastan ŝnuron sur ferdeko. Pro diablo, vi povus vidi somaterion sur picea pinto antaŭ ol kuiriston sur jardo, se regas ia ordo en la ŝipo.”

Tiaj ili estis, Vilĉjo kaj Izako. Ili neniom komprenis pri la klopodo aranĝi vortojn kiel kanton, kaj ke tial poetoj rajtas iom preteri faktojn por trovi taŭgan niĉon al ĉiu vorto. – Sed mi koleriĝis pro ilia kritikaĉo kaj diris: ”Ĉar la kanto estas tiel malbona, mi ne devigas vin aŭdi, mi kantas sola aŭ tute silentos.” Kaj tiel mi faris, sidis muta. Sed ĉu ili permesis al mi trankvilon? Tute ne, la knaboj devigis min ree kanti, unue riproĉe kaj poste preĝpete. Kaj do mi kantis:

*Ondoj ŝaŭmas jam sur la ferdeko.
Grimpas, ferlas ni laŭ la komand'
de l' ŝipestro. Sekunda perdeto
estus lasta misfar' de mortant'.*

”Jes certe”, diris Vilĉjo, ”tio estas riske kaj serioze.”

”Tutprave” aldonis Izako, ”estas riske kaj serioze, sed mi tamen preferus esti en tiu loko ol ĉi tie teni la rimenojn de nia ĉevalo Blanko. Kiel ajn mi tirkomandas, nenio okazas.”

Fakte Blanko tre pigre paŝis, sed mi kredas ke ankaŭ li volis aŭdi mian kanton kaj mi dankis Dion, ke ĉevaloj sin ne parolesprimas. Eble eĉ Blanko mian kanton malaprobis. – Nu, mi tamen ĝojis, ke almenaŭ unu strofo taŭgis ali ili, kaj kantis plu:

*Bona estas ja la kapitano.
Kiam estos aferoj "ol rajt",
li regalos nin per blanka pano,
grasviando kaj rumtrinka rajt'!*

”Blanka pano kun viando kaj rumo!” kriis Vilĉjo. – ”Kiel idiote, kiu nin tiel regalus. Kial vi ne diras, ke aperas kelnero al nia luksa lito kaj ni komandas: ’Ŝnapson kaj sandviĉon kaj bieron, sed tuj!’ Ne, Kalĉjo, kapon vi perdis, ĉar tiaĵojn kantas.”

Kaj Izako akompanis: ”Estas ekzakte kiel diras Vilĉjo.”

Nu jes, ceteron Izako ne dirus. Li ĉiam aplaŭde aliĝis al opinioj de Vilĉjo. Tiel estis. Sed mi ekkoleris kaj diris: ”Nun estas tiel, miaj knaboj, ke ĉar mi komencis tiun ĉi kanton, mi ĝin finkantos kondiĉe ke vi ne interrompas min antaŭ ol

kompletos la kanto. Poste vi rajtos riproĉi kaj mallaŭdi kiom vi volas. Alie mi absolute ne konsentas kantore servi.”

Nu, kion fari, la knaboj komprenrimarkis ke mi diris serioze, kaj promesis konduki kiel homoj. Mi grakpurigis la gorgon kaj daŭrigis:

*En haveno de nia cellando,
post bataloj de la itiner'
ni surmetos la veston de dando,
ŝanceliros sur firma la ter'!*

*Junulinoj en ĉiu mondparto
kompreneble sopiras al ni
en havenoj de l'tuta markarto,
en Afrik', Amerik', Aŭstrali'.*

*Sed la solan maristan sopiron,
korinklinon konkeris ŝi nur,
kiu hejme atendas la viron
promesintan ŝin ami kun ĵur'.*

*Gardu, ŝirmu l' maristojn, ho Dio!
Laboregas ni por la panpec'.
Oceane, lontanaj de ĉio
ja la ŝip' estas la liberec'.*

Post fino de la lasta refreno kaj kelktempa silento, Vilĉjo demandis: ”Ĉu nun finita?”


”Jes, finita.”

”Do tiel. Estas bela melodio en via kanto. Sed aŭskultu, vi ne plene komprenas kiel kompili kantojn. Sciu, terure ke vi kantas pri la inoj ĉirkaŭ la mondo. Vi devus tute ne tiaĵojn mencii. Komprenu, ke vi eble iam edziĝos, kaj se via edzino ekscios pri tiaj konfesoj, gardu vin.”

Nu tiel, vi komprenas, ke Vilĉjo kaj Izako neniom komprenas pri versforĝado. Mi tute komprenas, ke ili min ne laŭdegis. Sed ĉagrenigis min riproĉoj kaj senvalorigo de mia laboro, kaj fine mi diris: ”Vi neniom devis pagi por mia kanto kaj ne estis devigitaj ĝin aŭdi, male vi devigis min prezenti.” Tiam la knaboj ekhontis kaj ĉesis remaĉi la aferon.

Glosoj:

jardo: transversa velstango, al kiu la supra rando de velo estas fiksita: antaŭa, meza, posta jardo
ferli: fiksi brajlitan velon al jardo aŭ bumo
somaterio: molanaso (finne: *haahka*)





Heli Laaksonen (n. 1972) staras sur la pinto de la nuntempa popollingva, dialekta literaturo finna; furoras ŝiaj poemoj, teatraĵoj kaj noveletoj en la sudokcidentfinna dialekto. La suba poemo aperis en la tago de Aleksis Kivi (10.10. en 2013) honore al tiu pioniro de la finnlingva literaturo kaj la Semajno de Pliaĝuloj.

Heli dediĉas sian pecon al Kivi kaj senioroj. Traduko kaj publikigo kun permeso de la aŭtoro.

Kaunistus

Mummu,
saataisko mee meikata sunt?

Vähäflikan kans o ostettu ensmäset teinikamppet
ja tahrottais testata.
Viikolopuks kyläilemä tullu mummu anta.

Pohjusteta meikkivoittel, pink ivory.
sormie al tuntu tuttu luu,
maalaisnaise naama muuttu kinkusävyseks.
Puuter,
poskpuna,
hilehuulkiilto.

Mummun kissankellosinise silmä näyttävä
hailuilt lilas kajalis.
Tähremuatose riipukse venuttava hänen
peurankorvas pitkiks.

Mummu,
ei mee osattu tehreä sunst yhtän kaunemppa
ei niin kaunist voi tehreä
ko mitä olet.

Aleksis Kiven päivän, vanhuste viikol
jaettavaks kenel tykkä
kirjotti Laaksose Heli

Plibeligo

Avinjo,
ĉu vi permesas al ni vin beligi?

Ni aĉetis, mi kun kaj al la plijuna filino,
unuan fraŭlinan kosmetikon
kaj ni ŝatus tiun testi.
La avino veninta por semajnfino permesas.

Ni fondas per baza pasto, pink ivory.
Sentas konatan oston sub la fingroj,
la vizaĝo de kampanino transkoloriĝas ŝinksimila.
Pudro,
vangoruĝo,
glima lipobrilajo.

La miozote bluaj okuloj de Avinjo dronas ĉirkaŭataj
de violkolora kajalo.
Stelformaj pendaĵoj tirlongigas ŝiajn cervecajn orelojn.

Avinjo,
ni tute ne sciis plibeligi vin
ne eblas fari tiel belan
kia estas vi.

En la tago de Aleksis Kivi,
en la semajno de pliaĝuloj
por disdoni al kiu ajn
verkis *Heli Laaksonen* (trad. *Tuomo Grundsrom*)

Pikarijäkälät, Anu Matilainen, 2001.
Runoilija Helvi Juvosen muistomerkki
Iisalmen kulttuurikeskuksen edessä.
Kuva: RP.



Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Aineisto 24.11.2024 mennessä toimitukseen.

La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 24.11.2024 al la redakcio.

Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, s-posti/rete: eaf@esperanto.fi.